POLSKI ZWIĄZEK ESPERANTYSTÓW
Oddział Wojew[illegible]zki

1985 oktobro
78a jaro
n-ro 958 (10)

esperanto

ISSN 0014-0635

aperas monate (escepte de aŭgusto)

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



UN: 40 jarojn kun lingva diskriminacio

Vi trovos

ke ni ne sukcesis trakti ĉiujn erojn de la Universala Kongreso en la septembra numero. Ni provis. Fine de la "kongres-sezono", ni nun prezentas raportojn pri diversaj renkontiĝoj el Brazilo, Hungario, Japanio, Jugoslavio, Nederlando kaj Usono. Tio kaŭzis ne nur tion, ke ni devis severe tranĉi kelkajn artikolojn, sed prokrasti aliajn. Cetere, la esprimo "kongres-sezono" espereble ne diskriminacias kontraŭ kelkaj sudhemisferaj landaj movadoj. En Aŭgsburgo prave leviĝis kritiko, ke iuj emas forgesi, ke la Internacia Lingvo nun jam estas tutmonda fenomeno.

Enhavo

161 Jubileo de UN: La Internacia Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj (Humphrey Tonkin)
162 Tri honoritoj: Marjorie Boulton, Harry Harrison, I Ĝe-Hjon
Komitato de UEA: Proponi kandidatojn por komitatanoj B antaŭ la 1-a de februaro 1986
163 Informado: Informa ondo en nederlandaj lernejoj?
164 Kongresoj: Interesoveka nacia kongreso en Brazilo; SAT en Nederlando (Laŭ *Sennaciulo*); Kunloĝado prosperas (Gotô Hitosi)
165 Instruado: Dek ses jaroj en San-Francisko (Curtis Ford)
167 Faka agado: Interkibernetik '85: fakuloj el tri kontinentoj (Gábor Márkus)
168 Pupteatra Internacia Festivalo: Nacie kaj internacie (S. Štimec)
Internacia Kongresa Universitato: Pensiga kaj instiga, kiam aŭskultebla! (H.M. Maitzen)
169 Enketo pri la 70a UK: Mankis sufiĉaj eblecoj por aktiva partopreno (Osmo Buller)
170 Reago: Nepre ripetinda (W.A. Verloren van Themaat)
171 Recenzoj: *Biblia vortaro* komp. H. Paruzel k.a. (W.J. Downes); *Matematiko, instruado de matematiko kaj komputotekniko* red. I. Koutny (C. Kiselman); *Ne nur leteroj de plumamikoj; Esperanta literaturo – fenomeno unika* de Marjorie Boulton (G. Cansdale)
173 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
175 TEJO-paĝo: Pli malaltaj kotizoj por la 42a IJK (J. Ŝemer/A. Wandel); Gejunuloj kaptas atenton (P. Todorov)
176 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
178 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de UEA
179 Nekrologoj; Kotiztabelo por 1986
180 Anoncetoj

La kovrilo

montras la ĉefsidejon de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko: la 39-etaĝan konstruaĵon de la Sekretariato dekstre, kun la halo de la Ĝenerala Asembleo kaj konferencejoj antaŭe. Pri la lingvaj aspektoj de la 40 jaroj de UN temas nia ĉefartikolo de Humphrey Tonkin. UN estas forumo daŭre atakenda pri la ebleco forigi la lingvan diskriminacion el internaciaj rilatoj, kvankam UN mem kredeble ne povos solvi sian propran lingvoproblemon ĝis plimulto de ĝiaj ŝtatoj-membroj agnoskos la avantaĝojn de la neŭtrala Internacia Lingvo. (Foto: Unuiĝintaj Nacioj/Saw Iwin.)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 36 15 39.
Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**
Voĉlegata por blinduloj.
Redaktoro: Geoffrey Sutton.
Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US $ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.
Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).
Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).
Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.
Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.
Vicprezidanto (informado): s-ro Umeda Yosimi, Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tôkyô, 153 Japanio.
Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.
Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio; ☎ (06) 95 25 713.
Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 237 14 73.
Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.
Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.
Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr. 958 (10), oktober 1985. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

La Internacia Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj

Por festi la 40-jaran datrevenon de Unuiĝintaj Nacioj, ni publikigas resumon de parolado, kiun d-ro Humphrey Tonkin prezentis i.a. la 20an de septembro antaŭ Esperanto-Societo de Novjorko.

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj direktas siajn aferojn en ses lingvoj. Antaŭ 40 jaroj, kiam UN estis fondita, estis nur du laborlingvoj (kvankam tri aliaj estis "oficialaj" lingvoj). La Eŭropa Komunumaro havas eĉ ankoraŭ pli komplikan lingvan situacion, kun sep lingvoj nun uzataj kaj pliaj lingvoj aldonotoj.

En tempo kiam la angla lingvo estas vaste uzata por internacia komunikado, ĉi tiu lingva diverseco eble ŝajnas surpriza. Ĝi estas rezulto ne tiel multe de la bezono komuniki kiel de la bezono por egaleco. En Eŭropa Komunumaro, ekzemple, ĉiuj ŝtatoj-partneroj estas egalaj kaj devas esti traktataj egale. Plie, multaj el iliaj decidoj havas leĝan validon kaj devas esti komunikataj en la naciaj lingvoj de la koncernaj landoj. Se la tuta komunikado okazus en la angla, la angleparolantaj landoj ĝuus netolereblan avantaĝon en internaciaj organizoj kiel Unuiĝintaj Nacioj aŭ Eŭropa Komunumaro (EK). Sekve, ĉi tiuj organizoj elektis uzi multajn lingvojn. Ŝajnas, ke ili estas devigataj elekti: inter neegaleco en unu lingvo aŭ egaleco kun multaj lingvoj.

La lingva diverseco necesigas komplikajn tradukajn kaj interpretajn servojn. Tiel multe kiel 40 procentoj de la administra buĝeto de EK estas uzata por lingvaj servoj, kaj ĉe UN tiom kiel 15 procentoj de la *totala* buĝeto estas uzata por similaj celoj. Kaj ĉiun fojon, kiam plia lingvo estas aldonita, la kostoj altiĝas geometrie.

Bedaŭrinde, eĉ ellaboritaj lingvaj servoj, kvankam eble bonegaj, ne donas plenan egalecon. Multe de la laboro de EK devas okazi en neformalaj kunsidoj sen interpretistoj, kaj multnombrajn neoficialajn aŭ duon-oficialajn dokumentojn oni ne tradukas en ĉiun laborlingvon. Ĉe UN aldoniĝas la kroma malavantaĝo, ke ne ĉiuj el la lingvoj de ŝtatoj-membroj estas fakte uzataj. Nacioj kiel Usono, Sovetunio, Hispanio aŭ Francio povas uzi sian propran lingvon, sed nacioj kiel Japanio aŭ Brazilo ne povas.

Ĉu la elekto neeviteble estas inter la uzo de unu sola lingvo unuflanke kaj egaleco aliflanke? Subtenantoj de Esperanto opinias, ke estas eble havi ambaŭ.

La historio de Esperanto en internaciaj organizoj estas fascina. Proponita kiel la lingvo de Ligo de Nacioj en 1920, ĝi preskaŭ gajnis akcepton. Kun la Esperanto-movado en malordo en 1945, unuavice pro ĝia detruo fare de Hitler kaj Stalin en la 1930-aj kaj 40-aj jaroj, Esperanto ne gajnis seriozan atenton de UN, kiam tiu organizo estis fondata. Pli postaj proponoj pri ĝia alpreno estis aŭ flankenigitaj (kiel okazis en la fruaj 50-aj jaroj) aŭ simple ignoritaj (kiel en 1966), ĉefe ĉar ili minacis la pozicion de la ekzistantaj laborlingvoj.

Tamen, dum oficiala subteno flanke de UN ankoraŭ mankas, Esperanto faris rimarkindan progreson dum la pasintaj 40 jaroj. Ĝi gajnis ankaŭ iom da oficiala rekono. En 1954 rezolucio de Unesko rekonis la atingojn de la lingvo alproksimigi la popolojn de la mondo, kaj Universala Esperanto-Asocio ĝuas oficialajn konsultajn rilatojn kun Unesko. Ĝi havas similajn ligojn kun Organizo de Amerikaj Ŝtatoj, kaj ĝi estas "sur la deĵortabelo" de organizoj, ligitaj kun Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN. Pluraj oficialaj UN-dokumentoj jam aperis en Esperanto.

De post 1979 Universala Esperanto-Asocio havas sian propran oficejon ĉe UN. La celo de tiu oficejo estas helpi Unuiĝintajn Naciojn kompreni la karakteron de sia lingva problemo kaj la solvon, kiun Esperanto prezentas. La oficejon funkciigas volontuloj, malstrikte ligitaj en "laborgrupoj". Profesian helpon donas personaro sub la gvido de la prezidanto de la grupo.

La novjorka oficejo de UEA respondecas pri multnombraj taskoj, inkluzive de la produktado de informilo, la organizado de jara konferenco kaj reprezentado de UEA en agadoj de UN. Ĝi estas ankaŭ la ĉefa rekomendanto de Esperanto ĉe UN. La laboro de la oficejo, fakte la tuta direkto de la laboro de UEA ĉe UN, prenas sian inspiron el la tiel nomata Plano Harry (laŭ la iama Ambasadoro de Aŭstralio ĉe UN Ralph Harry, esperantisto). La Plano Harry proponas laŭgradan enkondukon de Esperanto ĉe UN dum konsiderinda periodo. Unue, oni uzus Esperanton kiel traduklingvon por certaj specoj de materialo, flank-al-flanke kun la aliaj lingvoj. Dume, kursoj kaj aliaj programoj por helpi homojn lerni la lingvon estus komencitaj, kaj oni instigus la stabon partopreni ilin, samkiel oni faras por la aliaj laborlingvoj de la organizo.

Due, Esperanto fariĝus la sola lingvo de registrado por certaj dokumentoj, kiuj ne estus tradukitaj en aliajn lingvojn. Iom post iom tiu aranĝo ĝeneraliĝus, ĝis ĝi kovrus la plimulton de la dokumentoj. Dume, la mono ŝparita je tradukado estus investita en la interpretaj servoj, kun la celo fortigi tiujn servojn kaj komenci enkonduki aldonajn lingvojn en certaj cirkonstancoj. Esperanto estus enkondukita ankaŭ kiel lingvo de interpretado por certaj specoj de kun-

venoj. Etapon post etapo, dum homoj alkutimiĝus al Esperanto, la lingvo iĝus la ĉefa lingvo de la interpretado. Anstataŭ interpreti ĉiun paroladon kaj ĉiun intervenon en kvin aliajn lingvojn, interpretistoj laborus el multaj lingvoj, sed interpretus en nur Esperanton. Rezulte, pli da personoj povus uzi sian gepatran lingvon en debatoj, pli da egaleco estus atingita kaj ĉiuj diskutoj estus interpretitaj en Esperanton.

Aparte interesa aspekto de la Plano Harry estas la fakto, ke ĝi ne proponas forigi la uzon de naciaj lingvoj el UN, sed fakte pligrandigas ilian nombron. Sekve ĝi estas nenia granda minaco al iu ajn, kaj ĝia alpreno okazus simple per laŭgrada akcepto. Estas bona ŝanco, kompreneble, ke teknologio ludos rolon en tiu procedo. Esperanto jam komencas interesi tiujn, kiuj laboras pri kompute helpata tradukado. Eble venos la tago, kiam Esperanto formos la centran ŝaltmekanismon kaj por aŭtomataj kaj por homaj sistemoj de lingva komunikado ĉe UN, en EK kaj aliloke. Komunikado fariĝos pli efika kaj pli egalrajta, se tian celon oni atingos.

Humphrey Tonkin

Tri honoritoj

Kiel promesite en la pasinta numero de la revuo, sekvas koncizaj biografioj de la tri membroj, honoritaj de la Komitato de UEA en Aŭgsburgo. Ano de Honora Patrona Komitato ne devas esti movadano, sed subtenanto en ekstermovade grava pozicio. Honora Membro faris gravan servon por UEA aŭ la Internacia Lingvo.

Marjorie Boulton (1924) doktoriĝis pri literaturscienco. La postan jaron, 1949, ŝi lernis Esperanton. Ŝi debutis kiel Esperanta verkisto i.a. en la Belartaj Konkursoj de UEA. En 1958 ŝi estis la unua ricevanto de la Arĝenta Sprono de la eldonejo Koko.

Dum multaj jaroj ŝi estis la direktoro de porinstruista kolegio, sed ŝi nun estas profesia verkisto.

Boulton oficis kiel sekretario de Internacia Somera Universitato (1957-62), de la Internacia Ekzameno (1961-67) kaj prezidanto de Societo de Britaj Esperanto-Instruistoj (1969).

Ekster la Esperanto-movado Marjorie Boulton estas vaste konata kiel verkinto de didaktikaj libroj pri literaturo.

La plej gravaj Esperantaj verkoj de Boulton estas *Kontralte* (1955), poezio, *Virino ĉe la landlimo: Drameto kaj skeĉoj* (1959), *Eroj, kaj aliaj poemoj* (1959), *Zamenhof, Creator of Esperanto* (1960, '80), anglalingva biografio, *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto* (1962), *Dek du piedetoj* (1964), *Okuloj: novelaro* (1967), *Rimleteroj* (1976), poemaro kun William Auld, *Poeto fajrakora; La verkaro de Julio Baghy* (1983), literatura studo, *Faktoj kaj fantazioj* (1984), progresiga legolibro, *Ne nur leteroj de plum-amikoj; Esperanta literaturo – fenomeno unika* (1984) kaj *Du el* (1985), poemaro kun Poul Thorsen.

La Komitato elektis d-inon Boulton Honora Membro de UEA.

Harry Harrison (1925) estas produktiva verkisto de anglalingva sciencfikcio, kiu ricevis multajn premiojn kaj honorojn. Li multe propagandis Esperanton en siaj romanoj. (Vd. la ampleksan intervjuon en

KOMITATO DE UEA:

Proponi kandidatojn por komitatanoj B antaŭ la 1-a de februaro 1986

En 1986 okazos nova elekto de ĉiuj anoj de la Komitato de UEA, la plej supera organo de la Asocio. Laŭ la Statuto kaj la Ĝenerala Regularo, la komitatanojn A elektas ĉefe la aliĝintaj landaj kaj fakaj asocioj, **pri komitatanoj B voĉdonas ĉiuj individuaj membroj de UEA**, dum la komitatanojn C elektas la komitatanoj A kaj B.

Konforme al la artikoloj 24 de la Statuto kaj 25 de la Ĝenerala Regularo, **la nombro de komitatanoj B ĉi-foje elekteblaj estas sep**. Laŭ la reguloj, po dek individuaj membroj el almenaŭ tri diversaj landoj rajtas proponi nur unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio. Al la proponoj, subskribitaj de la proponantoj, devas esti aldonitaj: skriba konsento de la kandidato, biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksu maksimume 150 vortojn. La kandidatigoj, kompletaj laŭ la ĉi-supra priskribo, devas atingi la Centran Oficejon en Roterdamo **antaŭ la 1-a de februaro 1986**.

Se la nombro de validaj kandidatoj ne estos pli ol sep, ili ĉiuj estos konsideritaj kiel elektitaj. Se la kandidatoj estos pli multaj, en aprilo aŭ majo 1986 estos sendita voĉdonilo al ĉiu individua membro de la Asocio.

Oni bonvolu atenti la statutan preskribon, ke ĉiu komitatano devas esti individua membro de UEA dum la du jaroj antaŭ la elektiĝo (ĉi tie do temas pri la membreco en 1984 kaj 1985) kaj resti individua membro tra la tuta oficperiodo. Necesas memori ankaŭ, ke ĉiuj komitatanoj principe estas reelekteblaj, dum salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano. Gravas krome konscii, ke ni ĉi-foje elektas la Komitaton, kiu gvidos la Asocion tra la Jubilea Jaro kaj kondukos nin al la dua jarcento de la Internacia Lingvo.

Esperanto, p.86-88/1985.) La Komitato elektis Harrison membro de Honora Patrona Komitato.

I Ĝe-Hjon (Li Hajpin, 1917). Li pasigis siajn junajn jarojn en Ĉinio, kie li partoprenis la movadon por sendependa Koreio. Li lernis Esperanton en 1935 en Ŝanhajo, kunlaboris kun la Esperanto-klubo de Universitato Sun Jatsen kaj kontribuis al la gazeto *Orienta kuriero*.

En 1946 li revenis al Koreio, kie li organizis kaj gvidis Esperanto-kursojn en la universitatoj de Seulo kaj Sansu. Post la sendependiĝo de Koreio en 1949, li organizis Busanan Esperanto-Klubon en la urbo Busan, kie li daŭrigis sian gvidadon de kursoj.

En 1951 li eldonis *Esperanto-lernolibro* kaj komencis la 14-jaran laboron verki *Esperanto-korea vortaro*, kiu aperis en 1969. Dank' al la ekesto de tiu vortaro, la korea Esperanto-movado povis kreski.

En 1969, laborante en Vjetnamio, li helpis ankaŭ la tiean Esperanto-movadon.

En 1977 aperis kolekto de liaj originalaj kaj tradukitaj verkaĵoj: *Tra la kamparo*. Sed li jam eklaboris super dua monumenta tasko, Korea-Esperanta vortaro, kiu aperis en 1983.

Korea Esperanto-Asocio elektis Li Hajpin vicprezidanto en 1983. Ĉi-jare la Komitato de UEA elektis Li Hajpin Honora Membro.

INFORMADO

Informa ondo en nederlandaj lernejoj?

La 13an de septembro aperis en Nederlando, en konata ĉiusemajne aperanta serio de informaj libretoj *AO/Actuele onderwerpen* (Aktualaj temoj, n-ro 2081), la 24-paĝa libreto *Esperanto – van reageerbuis tot moedertaal* (Esperanto – de provtuba al gepatra lingvo). Verkis ĝin A. de Jong, sekretario de Fondumo Esperanto ĉe la Instruado kaj prezidanto de Federacio de Laboristaj Esperantistoj. La abonantoj de la AO-serio nun povas legi pri la provoj krei internacian lingvon dum la jarcentoj, iom pri la strukturo de Esperanto, pri ĝia taŭgeco kaj neceso por la instruado, pri la rolo, kiun ĝi povas ludi kiel interlingvo en permaŝina tradukado, kaj iom pri lingvopolitiko.

Sammonate, ĉe la sama eldonejo de lernolibroj, IVIO, aperis 15-paĝa, A4-formata "lecion-kajero", projektita de Fondumo Esperanto ĉe la Instruado. Ĝia titolo estas *Allemaal een andere taal* (Alia lingvo por ĉiuj), diversmaniere interpretebla nederlandlingve. Tiu kajero estas celita por lernantoj de la unuaj klasoj de daŭrigaj lernejoj kaj la superaj klasoj de bazaj lernejoj, por la aĝo-grupo 11- ĝis 14-jara. Per legado de mallongaj tekstoj, rigardado al fotoj, respondado al demandoj, farado de ekzercoj kaj per enklasa diskutado, la lernantoj povas ekhavi ideon pri la lingva diverseco en la mondo, pri la multekosteco de tradukado, pri la diskriminacia flanko de internacia uzado de naciaj lingvoj kaj pri la ekzisto de neŭtrala internacia lingvo. Krome ili iom ekkonos ĝian strukturon, farante eĉ mallongajn traduk-ekzercetojn. Tiuspecaj kajeroj cetere ne estas nekonataj ĉe la lernejoj. Regule aperas tiaj lernomaterialoj, celitaj por fari lecionon pri certa temo. La instruistoj do scias kiel utiligi ilin.

La eldonejo IVIO dissendis po unu ekzempleron al miloj da daŭrigaj lernejoj, kune kun sia informbulteno, en kiu troviĝas artikolo pri la celo de la eldonaĵo, forte akcentanta la okazadon de diskriminacio pro kaj per lingvoj. Al la bulteno aldoniĝis ankaŭ po unu ekzemplero de la AO-libreto, kiel fona materialo por la instruisto. La eldonejo atendas, ke surbaze de tio la lernejoj mendos kvantojn por enklasa utiligo. La Fondumo mem distribuos grandan kvanton al bazaj lernejoj, ĉar tiuj ne apartenas al la kutimaj klientoj de IVIO.

El la informbulteno de IVIO citindas la sekvaj frazoj:

– "Krom haŭtkoloro, la lingvouzo formas verŝajne unu el la plej gravaj kriterioj, per kiu 'rekoni' ies



etnan fonon. En tiu rolo la lingva diferenco (sen la necesa kompreno) povas esti unu el la bazoj de la diskriminacio."

– "Esperanto estas la sola vivanta ekzemplo, por tio ke homoj de tute diversaj etnaj fonoj interkomunikas sur perfekte egala nivelo – almenaŭ koncerne la lingvon".

– "Eblas kritiki uzantojn de Esperanto, ke ili tro multe rezervas por si mem ĉi tiun eblecon kaj siajn

spertojn pri ĝi tenas kaŝitaj ĉe si; ke ili tro malmulte faras por montri ankaŭ al aliaj la ja unikan eblecon de sendiskriminacia komunikado."

Grava aspekto estas, ke Fondumo Esperanto ĉe la Instruado ne nur preparis la materialon, sed trovis manieron eldonigi ĝin pere de neesperantista eldonejo de lernolibroj, kiu disponas pri vojoj por atingi la celatan legontaron.

KONGRESOJ

Interesoveka nacia kongreso en Brazilo

Sescent ok aliĝintoj el 18 brazilaj ŝtatoj kaj unu el Usono: jen la ciferoj, kiuj ebligas aserti, ke la ĉi-jara 21a Brazila Kongreso de Esperanto en Belo Horizonte estis unu el la plej grandaj naciaj Esperanto-kongresoj en Brazilo. Belo Horizonte estas laŭ grandeco la tria urbo de la lando, kun unu kaj duona milionoj da loĝantoj. La kongresejo estis vasta kaj komforta.

La kongreson organizis Belo-Horizonta Esperanto-Asocio, kies plej granda sukceso estis la atento, kiun la amaskomunikiloj direktis al la evento. Antaŭ la malfermo okazis la gazetara intervjuo, en kiu partoprenis raportistoj de kaj ĵurnaloj kaj televid- kaj radiostacioj.

En la malferma solenaĵo prof. Wilson Chaves, reprezentanto de Lia Ŝtatestra Moŝto, salutis la ĉeestantojn. La solenaĵon sekvis arta programo, kiu i.a. antaŭlanĉis diskon kun brazila popularа muziko, originale komponita en Esperanto. Sin prezentis Flávio Fonseca, aŭtoro de la muziko kun sia grupo. (Por pliaj detaloj vd. sub Loke: Brazilo.)

Okaze de la kongreso, la ĵurnalisto Afonso Romano komentis en *Jornal do Brasil*, unu el la plej

Akcentado de la ekstera informado portis Esperanton manifestacie sur la stratojn de Belo Horizonte.

Fotoj: Roberto Resende

Malofte oni vidas tiel grandajn ĉestratajn afiŝojn pri la Internacia Lingvo kiel tiuj, kiujn aranĝis la organizantoj de la brazila nacia kongreso.

legataj periodaĵoj de la lando, aperanta en 170 mil ekzempleroj: "Scipovi unu fremdan lingvon signifas la rompon de unu baro. Scipovi kelkajn lingvojn signifas la rompon de pluraj baroj. Scipovi Esperanton signifas la volon rompi ĉiujn barojn samtempe." Reto Globo kaj TV-Manchete, la plej gravaj televidaj stacioj en Belo Horizonte, elsendis al la tuta lando novaĵojn pri la kongreso kaj la manifestacio, kiu trairis la urbocentron ekde la kongresejo ĝis Placo Zamenhof.

Ligite al la kongresa temo "Survoje al la centjariĝo: Esperanto sur la stratoj", oni aŭskultis prelegojn kaj partoprenis debatojn. Aliaj prelegoj temis pri arto, astrologio, medicino, stomatologio, instruado kaj eldonado. Okazis ankaŭ fruktodonaj diskutoj pri la ĝenerala situacio de la landa movado.

Libroservo perfekte funkciis kaj multe vendis. Aparte plaĉis al la publiko la kurso por komencantoj de Sylla Chaves kaj la kurso por Esperanto-instruistoj de prof. Geraldo Mattos. Menciindas ankaŭ la multvizititaj arta, turisma kaj medicina ekspozicioj.

La distra parto konsistis el serenado ĉe Placo Zamenhof, turismaj vizitoj al historiaj urboj kaj balo.

La venontjara brazila Esperanto-kongreso okazos en Curitiba, kaj en 1987 en Rio-de-Ĵanejro.

SAT en Nederlando

La 58a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazis de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto en Amersfoort, Nederlando. Aliĝis 225 kongresanoj el 15 landoj. Aldone al la densa programo, estis riĉa libroservo de la nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj, filatela ekspozicio kaj infankongre-

seto. Ankaŭ ĉi-jare oni povis rigardi vidbendon pri la kongresaj okazintaĵoj.

Sabate vespere la kongresanoj povis kontaktiĝi kun la urbo, dank' al prelego kun lumbildoj de la arkitekto respondeca pri la monumentoj de Amersfoort.

Dimanĉon matene okazis la solena malfermo. Salutis la kongreson nome de Universala Esperanto-Asocio s-ro Grégoire Maertens, prezidanto. Krom li, partoprenis la malfermon ankaŭ la ĝenerala sekretario de UEA, d-ino Flóra Szabó-Felsö. Nome de Ĉina Esperanto-Ligo salutis s-ro Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario. Vespere, post vizito al la urbo, okazis speciala kunveno kun landaj perantoj kaj ĝeneralaj konsilantoj cele al revigligo de la asocio. Ekde la lundo, preskaŭ ĉiumatene okazis laborkunsidoj, sufiĉe bone partoprenataj.

Ĉi-jare la SAT-kongreso havis kongresan ĉeftemon: "Laboro: ĉu puno aŭ beno?" Okazis ses diversaj prezentoj de la temo, post kio sekvis forumo. La kongresanoj montris la deziron, ke ankaŭ la estontaj kongresoj havu ĉeftemon.

Krom tri duontagaj kaj unu tuttaga ekskursoj, okazis ankaŭ teatro. Dum du vesperoj Jerzy Fornal, aktoro de la Nacia Teatro el Varsovio, prezentis kelkajn verkojn, kaj ludis la japana ombroteatro Vesperruĝo de s-inoj Rowena MacGill kaj Miyamoto Akiko.

Fine de la kongreso s-ro Juan Solé invitis la 59an SAT-Kongreson al Hispanio. Ĝi okazos de la 2a ĝis la 8a de aŭgusto 1986 en Sant Cugat del Vallès (apud Barcelono). Antaŭkongreso okazos de la 26a de julio en Valo de Ordesa en la aragona Pireneo.

Laŭ *Sennaciulo*

Kunloĝado prosperas

Esperanto en perspektivo prezentas foton kun la klarigo: "'Kunloĝadoj', kiel japanaj gejunuloj baptis siajn intensajn lingvajn kursojn, estas populara kaj ofta agadformo de la junularo en tiu lando." Pli ol dek jarojn poste, la frazo ankoraŭ validas.

"Populara kaj ofta" ĝi estas. *Gassyuku* en la japana lingvo, "kunloĝado" ne estas inventaĵo de Esperantujo. Lernejanoj, studentoj, hobigrupanoj, sindikatanoj ktp. ofte kunloĝadas en pli-malpli malproksima gastejo por seminarie plialtigi la amikecon inter la anoj. La plej bona ekzemplo de japana esperantista kunloĝado kredeble estas la ĉiujara Tutlanda Kunloĝado de Esperantistoj, organizata de la Esperanto-domo, Tokio. Jam la dekoka en la historio, la ĉijara renkontiĝo okazis komence de majo en la urbo Iruma, apud Tokio; ne Yaizu, kiel en la lastaj jaroj.

"Intensa lingva kurso" ĝi restas. Ĉirkaŭ cent partoprenantoj ŝvitis super la lernado kaj la ekzercado de Esperanto: la kvartagan programon okupis 11 horoj da lernado (en 11 klasoj, inkluzive de tiu por infanoj), du horoj da prelegoj (en du niveloj), du horoj da ekzameno (elektebla) kaj du horoj da fakkunsidoj. Memoru, ke la unua tago komenciĝis vespere, kaj la lasta finiĝis tagmeze. Tamen ne mankis distraj programeroj, ĉar unu celo de la kunloĝado ja estas la amikeco. En iuj ĉambroj alkoholo odoris ĝis, aŭ eĉ post, la noktomezo. Pli ĝuste kultura estis la plaĉa prezento de la siluet-teatraĵo, *La edziniĝo de la musino*, laŭ malnova japana rakonto, per kiu la ombroteatro Vesperruĝo anticipis siajn prezentojn



en Pupteatra Internacia Festivalo (vd. alipaĝe en ĉiu tiu numero) kaj turneon tra Eŭropo.

"Tutlanda" la kunloĝado preskaŭ estis. Certe la plimulto venis el Tokio aŭ la proksima regiono, sed ne malmultaj bezonis vojaĝi 300, 500 aŭ eĉ mil kilometrojn por atingi la ejon. Sed tio neniel signifas, ke la kunloĝado estis ekskluzive japana. Alilandanoj ĉiam estas bonvenaj. Unu membro de la ombroteatro estas novzeland-devena, kaj surprizis la partoprenantojn franca paro. Pli notinda estas la kutimo inviti korean junul(in)on per la kunloĝada kaso. La ĉi-jara gasto, f-ino Kim Jeon-ok, prelegis pri koreaj moroj, kaj poste vojaĝis tra Japanio survoje reen al sia hejmlando. Tiel ĉi tiu kunloĝado ofertas unu plian okazon por kontaktoj inter la junaj esperantistoj de ambaŭ landoj.

Gotô Hitosi

INSTRUADO

Dek ses jaroj en San-Francisko

Por festi dek kvin jarojn de la someraj Esperanto-kursoj en San-Franciska Ŝtata Universitato, Usono, ELNA Newsletter, *la organo de la usona landa asocio de UEA, pasintjare eldonis specialan numeron pri la historio kaj aktualo de la kursoj. Tra tiuj nun jam dek*

ses jaroj laboris por la kursoj, unikaj en Norda Ameriko, multaj personoj vaste konataj en la monda Esperanto-movado. La sekvan artikolon pri la ĉi-jara sesio verkis juna partopreninto, kiu komencis studi Esperanton antaŭ 20 monatoj.

Promenante tra San-Franciska Ŝtata Universitato (SFŜU) somere, oni sentas la kutiman etoson de usona universitata vivo: studentoj rapidas al la lecionoj matene, kuŝas sur la razeno tagmeze. Sed mi sentis ĉi-jare ankaŭ alian etoson, tiun de Esperantujo, dum la 16a somera Esperanto-kursaro: trisemajnaj, intensaj kursoj, kiuj celas kapabligi studentojn paroli, aŭdkompreni, legi kaj skribi en la Internacia Lingvo.

Dum multaj jaroj la geografie disigita usona esperantistaro sentis la bezonon de regula, intensa studprogramo. Kiam en 1970 oni sukcesis organizi la unuajn somerajn kursojn ĉe SFŜU, fine realiĝis ebleco plenumi tiun bezonon. La aranĝo estis, en la fruaj tagoj, iom malgrandskala; William Auld, plurfoja instruisto ĉe la kursoj, instruis du nivelojn – bazan kaj progresigan. Sed la posta kreskado de la kursoj kondukis al ĝia sukceso en 1985, kiam tri instruistoj – d-roj Duncan Charters, James Cool kaj Amri Wandel – laboris kun proksimume 70 kursanoj el Usono, Kanado kaj Aŭstralio.

Grava eco de la kursoj estas, ke preskaŭ ĉiuj lernantoj kaj manĝas kaj loĝas kune ĉe la universitato. Tio ebligas vere intensan Esperanto-etoson, en kiu oni apenaŭ aŭdas krokodiladon. Post ekzameno en la unua tago, la partoprenantaro dividiĝas en kvar grupojn: komencantan, postkomencantan, progresintan kaj superan. Ĉiu grupo kunvenas dum tri horoj tage, kaj la horaro estas tiel planita, ke studentoj povas kromaŭskulti lecionojn sur unu nivelo pli aŭ malpli alta ol la sia. Ĉi-jare prezentiĝis ankaŭ vespera kurso pri metodiko de fremdlingva kaj Esperanta instruado.

La komencantoj lernas per la rekta metodo, ofte uzante materialojn preparitajn aparte por ĉi tiu kurso. Lernolibroj por aliaj niveloj, sur kiuj oni ankaŭ uzis nur Esperanton, estis en 1985 i.a. *Paŝoj al plena posedo* de William Auld, *Faktoj kaj fantazioj* de Marjorie Boulton kaj *Elektitaj satiroj* de Efraim Kiŝon. La supera grupo lernas ne nur pri Esperanto, sed per Esperanto; ekzemple, ĉi-jare oni studis per la Esperanta traduko de *Don Quijote de la Mancha*, diskutante la signifon de la verko rilate al la tiama hispana socio.

Krom la regulaj kursoj supre menciitaj, oni aranĝis ankaŭ flankprogramon de prelegoj kaj diversaj prezentadoj. La enhavo kaj amplekso de tiuj programeroj multe dependas de la spertoj kaj iniciatemo de la studentaro. Ĝuste pro tio povas okazi nekutime varia elekto. En 1985, ekzemple, partoprenantoj pre-

Foto: Vallon-Wheeler

Novaj lernantoj de Esperanto paŭzas por manĝi.

legis pri la ĉeroka (indiana) lingvo kaj kulturo, pri la agado de TEJO, kaj aranĝis lumbildan prezentadon pri vojaĝo al Sudameriko.

Kompreneble ne mankas distraĵoj en la programo. Piknikoj kaj festoj ĉe lokaj esperantistoj jam iĝis firma tradicio, pli ligante la lokan klubon kun la agado ĉe la kursoj. Ĉi-jare organiziĝis inter la kursanaro ankaŭ popoldanca grupo kaj du ĥoretoj (vira kaj virina).

La fina rezulto de tiom da streĉa laboro kaj amuziĝo estas granda progreso en la lingvokapablo de Esperanto-parolantoj en Nordameriko. La ekzisto de tia programo, per kiu haveblas universitata kredito (poentoj) estas ankaŭ ege efika varbilo por Esperanto.

Studentoj akiras plian scion de la Internacia Lingvo kaj pli fortajn ligojn kun la Esperanto-movado. Sed poste restas ankaŭ bildoj de la komuna vivo: skeĉoj de rakontoj; studentoj, trinkante "kafaĉon" el la vend-aŭtomato, ridante kune, kaj verkante hejmtaskojn ĝis la tria matene; restas personaj spertoj ne nur de la lingvo Esperanto, sed ankaŭ de la Esperanto-komunumo.

Eksterlandaj kursanoj de ĉiuj aĝoj estas bonvenaj ĉe la Esperanto-kursaro de SFŜU. Kursanoj ofte estas finance subtenataj de siaj lokaj kluboj.

Curtis Ford

En 1986 **la** kursoj ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato okazos de la 30a de junio ĝis la 18a de julio. La nova instruistaro konsistos el: prof. David Jordan, antropologo-ĉinologo, Universitato de Kalifornio (San-Diego); d-ro James Cool, Kolegio Wilmington (Ohio), eksperto pri kompara literaturo kaj fremdaj lingvoj, kaj Nikola Rašić, Universitato de Zagrebo, fakulo pri la zagreba kaj aliaj instrumetodoj. Parto de la venontjara kurs-enhavo inkluzivos enkondukon en la ĉinajn lingvon, kulturon kaj literaturon. Seriozaj interesitoj petu detalojn de: Esperanto-Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010, Usono.

Interkibernetik' 85: fakuloj el tri kontinentoj

Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko (TAKIS) en Budapeŝto okazigis sian unuan kongreson, Interkibernetik' 85, de la 27a de julio ĝis la 2a de aŭgusto. La kongreson gastigis Komputoscienca Societo Johano Neumann, kiu organizis ankaŭ la kongreson Interkomputo en Budapeŝto fine de 1982.

Relative multaj prelegoj estis senditaj al d-ro Dan Maxwell, la sekretario de la programkomitato. Fine ĉirkaŭ kvindek estis akceptitaj en la tri laborlingvoj, Esperanto, la angla kaj la franca, de prelegontoj el 15 landoj de tri kontinentoj.

El scienca vidpunkto oni povas diri, ke la kongreso havis ne nur enlandan signifon, sed ankaŭ internacian, ĉar la prelegoj estis ĝenerale tre altnivelaj, kaj multaj novaj esplorrezultoj estas prezentitaj. Kaj la kongreso havis grandan signifon ankaŭ el la vidpunkto de la internacia Esperanto-movado. Triono de la prelegantoj uzis la Internacian Lingvon.

La prelegoj, en kvar sekcioj, kovris ege diversajn kampojn de la scienco. Dum la unua tago ni aŭdis tri gravajn prelegojn. Prof. Helmar Frank, la vicprezidanto de TAKIS kaj la direktoro de la Kibernetika Esplorinstituto en Universitato de Paderborn, prelegis pri la lingvorevolucia potencialo kaj la kibernetiko. Poste fariĝis vigla diskuto ne nur en la kvar sekciokunsidejoj, sed ankaŭ en la koridoroj.

La dua preleganto estis la belga profesoro d-ro Jean Ramaekers, kies prelego havis la titolon: "Informatiko kaj socio". La franca profesoro d-ro Robert Vallée estis la lasta preleganto dum la matena kunsido de la unua kongrestago. Li parolis pri la lingvoj, la komplekseco kaj la transformoj.

Posttagmeze komenciĝis la kunsido de la sekcio pri inĝeniera kibernetiko. La germana d-ro Klaus Weltner estis ties prezidanto. D-ro József Szabó (Hungario) prelegis pri la komputila grafiko kaj projekta geometrio. Pri simila temo interesiĝis la vjetnama partoprenanto de la kongreso, d-ro Vu Ngoc Cam, kandidato de teknikaj sciencoj. Li diris al mi post la prelego, ke li intencas utiligi la aŭditajn metodojn en sia instrulaboro en Universitato de Hanojo, kie li estas vicĉefo de departemento.

Roland Schnell (FR Germanio) parolis pri la apliko de sistemtekniko al problemoj de rubaĵo-mastrumado, kaj du ĉeĥoslovakaj inĝenieroj, Vladimir Nemec kaj Stefan Dolejsi, pri sistemo por la projektado de integrocirkvitoj. Unikan temon elektis Zorislav Sojat (Jugoslavio). Li prelegis pri la komputilo kun distribuita inteligento. Alia ĉeĥoslovaka inĝeniero, Josef Vojacek, parolis pri mikrokomputiloj produktataj en Ĉeĥoslovakio.

El tiuj kelkaj temoj bone videblas, ke la prelegoj traktis diversajn kampojn. Sufiĉe multaj prelegoj traktis problemojn de la lingvokibernetiko. La nordamerika d-ro Dan Maxwell prelegis pri la implikaj ĉenoj kaj profesoro Osvaldo Sangiorgi (Brazilo) traktis la "Lectio"-inform-kvantigilon de la pedagogia efiko de portugallingvaj instrulibroj.

D-ino Gocs raportis kiel la komputilo povus helpi la lingvoinstruadon. Prof. Chen Yuan, direktoro de Instituto por Aplika Lingvistiko de Ĉina Sociscienca Akademio tre interese parolis pri la kvanta mezurado kaj analizado de certaj elementoj de la moderna ĉina lingvo. Lia prelego ricevis la plej grandan atenton laŭ la opinio de multaj kongresanoj.

En la sekcio pri ĝenerala kibernetiko prof. Cesar Buda (Rumanio) prelegis pri la industria kibernetiko kaj prof. Stefan Neuschl (Ĉeĥoslovakio) pri problemoj de funkcio-aproksimado. D-ino Szilák (Hungario) traktis kelkajn filozofiajn problemojn de la kibernetiko.

En la biokibernetika sekcio la hungara d-ro András Farkas prezentis laŭ mi la plej interesan prelegon. Li elmontris psikokibernetikan modelon kaj traktis la temon de rilatoj inter kontraŭdiro kaj semantiko en problemsolvado.

Krom la sciencaj prelegoj okazis ankaŭ aliaj interesaj programeroj. La juna hungara inĝeniero Lajos Mohai prezentis sian perkomputilan traduksistemon en la komputilcentro de la kongresejo. Ĉiu partoprenanto povis persone provi en la praktiko, ke per ĝi oni povis traduki ordinarajn hungarajn frazojn en Esperanton aŭ el Esperanto en la hungaran.

Ĉirkaŭ kvarono de la prelegoj okazis en la franca. Esperanto superis eĉ la anglan rilate la oftecon de ĝia dumkongresa uzado. Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj plimalpli komprenis la anglan, kaj la buŝa tradukado de s-ino Ilona Koutny kaj Dan Maxwell estis pli ofte bezonata el la Internacia, kaj plej ofte el la franca, sed ne malmultaj prelegantoj, uzantaj la anglan, tre pene esprimis sin. Senkonteste, meza prelego en Esperanto estis lingve pli altnivela ol tia en la angla, kvankam diversaj prelegintoj ankoraŭ estis komencantoj en Esperanto.

Eble la fakto, ke la reprezentantoj de Žilina kaj de Taragona preskaŭ ekrivalis pri la okazigo de la dua Interkibernetik – tiel ke TAKIS decidis okazigi du kongresojn: 1987 en Žilina, 1988 en Taragona – estas konvinka pruvo pri la sukceso de Interkibernetik '85.

Gábor Márkus

Nacie kaj internacie

Verŝajne ne multaj Esperantaj aranĝoj ricevis en la nacia gazetaro la epiteton "La evento de la monato". Tian pritakson gajnis la 18a PIF – Pupteatra Internacia Festivalo okazinta en Jugoslavio de la 23a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro. La unuan fojon al tiu aranĝo, kiu dum la pasintaj jaroj okazadis en Zagrebo, aliĝis novaj kunfestivalaj urboj, Pula kaj Ljubljana. Dum la festivalaj tagoj okazis entute 127 prezentoj el 12 landoj. Naŭ ensembloj el ok landoj ludis 40 prezentojn en Esperanto. PIF dividiĝis en Esperanto-parton (kiu okazis dum la unuaj kvar festivalaj tagoj) kaj en nacian parton. La nacia parto montriĝis artisme multe pli forta. El inter la programeroj en Esperanto, kiuj alvenis el Belgio, Ĉeĥoslovakio, Hispanio, Italio, Japanio kaj Pollando, elstaris la teatraĵo el Islando, kies rakontoj pri islandaj gigantoj apartenis al la plej pintaj, viditaj en la lastaj jaroj.

PIF apartenas al esplorindaj fenomenoj de la Esperanto-kulturo: aranĝo, iniciatita de esperantistoj kaj vartata de ili, kiu senteble kontribuas al la teatra kulturo de iu lando, ligante fajnajn fadenojn de kultura interligilo transnacia.

Spomenka Štimec (Jugoslavio)



Sceno el* La revanta giganto *de Helga Steffenssen, prezentita de la islanda pupteatro Leikbrúðuland.

Pensiga kaj instiga, kiam aŭskultebla!

En la sesa numero de la kongresa kuriero oni povas legi raporton titolitan „Ege sukcesa IKU-sesio". La nuna raporto aliĝas al tiu epiteto. La temoj de la naŭ prelegoj (prof. M. Isaev ne povis veni al la UK) estis same variaj kiel allogaj. Triono de la prelegoj rilatis al natursciencaj aŭ teknikaj temoj (astronomio, parfumologio, informadiko), dum la aliaj du trionoj okupiĝis pri humansciencaj fakoj (esperantologio, literaturo, lingvistiko kaj psikologio). La interesiĝo de la publiko estis granda. La salono Wingen preskaŭ ĉiam plenplenis; dufoje oni devis eĉ transiri en pli grandan salonon por ebligi al ĉiuj aŭskulti. Cetere, la aŭskultado estis grave malhelpata, ĉar la organizantoj ne zorgis pri adekvata laŭtparolila sistemo (fakte, tia devus esti memkompreneblaĵo en moderna kongresejo).

IKU-prelegoj havas ĉefe popularigan karakteron; ili ne rilatas specialistajn temojn aŭ plej novajn ekkonojn (krom pri la Internacia Lingvo), sed ili tamen servas por disvastigi aŭ krei fakterminojn. Ĉar oni kelkfoje dum la UK parolis pri reformoj, eble estus utile konsideri reformon rilate la Internacian Kongresan Universitaton, por ke ĝia lingva funkcio estu pli akcentata kaj kontrolata. Utila estus kunlaboro de, ekzemple, la kreota Esperanta terminonormiga instituto (vd. p. 146 en la septembra numero de *Esperanto*).

D-ro Heiner Eichner, docento pri hindeŭropa lingvistiko en la universitato de Regensburg (FR Germanio) prezentis la lingvajn fontojn de Esperanto. La enhavo de la prelego devus fariĝi propraĵo de ĉiu esperantisto. Dum la pli ol ducent aŭskultantoj aŭdis parte konatajn detalojn, ili aliflanke pliprofundiĝis en la scion pri la vivcirkonstancoj de Zamenhof, kiuj ebligis – kune kun la lingvistike "naiva" genio lia – la kreadon de vivipova lingvo, supera al lingvaj projektoj de fakuloj.

La dua prelego alportis al la plimulto de la publiko certe tute novajn ekkonojn. Diplomkemiisto Rudi Hauger de Federacia Teknika Altlernejo en Zuriko

(Svislando) elektis "ĉiutagan" temon, tamen ĉefe neracie spertatan, por science pritrakti: la sciencon pri la odoroj kaj la teknikon de la parfumfarado. Al kiu ne ŝajnas sensacie, ke aldoni ĝis 10% da fekaĵodoro (kiu kompreneble "kuŝas" sub domina odoro) rezultigas erotizan parfumon?

Ankaŭ la tria IKU-prelego havis sensacian karakteron. Junjian Ye, profesoro pri literaturo en la universitatoj de Fudan, Nankino kaj Furen (Ĉinio), parolis pri la disvastiĝo de la fabeloj de Hans Christian Andersen en la nuntempa Ĉinio. Li mem enĉinigis la verkojn de Andersen. Por multaj estis okulfrapa novaĵo, kial Andersen tiel populariĝis en Ĉinio, nome pro la interkulturaj proprecoj elmontrataj en liaj fabeloj: bona homeco, amo kaj animo, kvankam la historia fono kaj la sociaj cirkonstancoj de la postimperiestra Ĉinio kaj de la Danlando de Andersen estas tute malsimilaj. Forta emocia subteno voĉiĝis en la diskuto post tiu unika, mejloŝtona prelego de Ye, ĉar montriĝis la tergloba kultura komunsento en ĝi, kiun peras kaj havigas al ni nia Esperanta komunumo.

Pri aplika lingvistiko prelegis István Szerdahelyi, profesoro-fakgvidanto pri Esperanto en Universitato Eötvös Loránd de Budapeŝto, antaŭ denove plenplena salono de aktivaj ĉeestantoj. Jam pri la termino "aplika lingvistiko" ekardis diskutado, ĉar Szerdahelyi preferas "aplikata lingvistiko", eĉ tiom ke li epitetis la rektoron de IKU "aplikata lingvisto", kion parto de la publiko, kiel ankaŭ tiu mem, rifuzis (kompreneble ne laŭenhave). Ĉiuj, kiuj konas Szerdahelyi, denove kontentiĝis pro la ĉarmo kaj sprito, per kiu li prezentis sian fakon. Kompreneble, tiu intelekta amuzo havas ankaŭ sian prezon: ĝi foruzas la magre disponeblan tempon, do laŭ propra konstato de la preleginto li devis ellasi 80% de sia manuskripto. Ne domaĝe, ĉar ĉiujn detalojn kaj nomojn oni povos legi en la aktoj de IKU.

Tibor Sekelj, la vaste konata juristo, muzeologo kaj etnologo el Subotica (Jugoslavio), prezentis en la kvina IKU-prelego skizon de projekto por novstila Esperanto-muzeo, kiu vekis grandan eĥon en la multnombra publiko. Ĝi hazarde akiris aktualecon, ĉar la unua ekzistanta Internacia Esperanto-Muzeo de Vieno ekde aprilo 1985 havas novan junan direktoron (mag. Herbert Mayer), kiu plenforte strebas al novorientado de tiu muzeo. Sekelj pledis por muzeo, kiu ne nur kolektu esperantaĵojn, sed kiu esploru, pristudu, publikigu kaj ekspoziciu pruvojn pri la evoluo de la kulturfenomeno Esperanto.

La prelego de prof. Humphrey Tonkin de la ŝtata universitato de Novjorko en Potsdam (Usono) altiris precipe grandan nombron da aŭskultantoj. Ne nur la konateco kaj personeco de la antaŭa UEA-prezidanto, sed ankaŭ la rilato de lia prelego "Antikvo kaj moderno en la literaturo" al la kongrestemo kaŭzis la neceson uzi la pli grandan salonon Grabowski. Mi bedaŭrinde ne havis la okazon aŭskulti la prelegon.

Margrete Landmark, emerita supera universitata lektoro pri psikologio de la universitato de Oslo, prelegis pri la evoluo de lingvaĵo ĉe infanoj: denove temo, kiu efikis kiel magneto al la publiko. Ŝi klarigis la diversajn ŝtupojn de la akiro de lingvo kiel fakte patrina lingvo, ekde la unuvortaj esprimoj ĝis la plena kapablo post ĉirkaŭ 3 jaroj. Interesa estas ankaŭ la lingva konduto de la infano rilate al neregulaĵoj, do ke la infano aplikas unue regulan morfologion en tiuj kazoj kaj nur poste malkovras la esceptojn. Necese la diskuto direktiĝis tial ankaŭ al la akiro de Esperanto ĉe la infanoj. Kaj ĝi fariĝis tiel centra, ke la rektoro decidis daŭrigi la diskutadon pri la temo en la tempo de la neokazonta prelego de Isaev. Ĉar la interesiĝo estis tiel enorma, mi proponas, ke sekva IKU aŭ alia aranĝo okupiĝu pri la akiro de Esperanto ĉe infanoj.

Amri Wandel, doktoro pri astrofiziko, docento en la universitatoj de Princeton kaj Maryland (Usono), ekspoziciis antaŭ saŭne ŝvitanta publikamaso nian universon, kia ĝi prezentiĝas surbaze de la ĝisnunaj scioj. Instruaj diagramoj kaj diapozitivoj akompanis la paroladon (genia estis lia truko inversigi la lumbildojn por kamufli la anglajn skribaĵojn!).

La lastan prelegon en ĉi tiu IKU donis Rudolf-Josef Fischer, doktoro pri medicina informadiko kaj docento en la universitato de Münster (FR Germanio). En la eble plej klara kaj modela formo (lingve kaj enhave) de la tuta IKU, Fischer prezentis antaŭ (nemeritite) reduktita publiko (pro programkolizio kun aliaj UK-eroj), kiel eblas sub difinitaj cirkonstancoj rompi la anonimecon de ekz. medicina datumbanko kaj eltiri per aro da demandoj pri "kiom da homoj...", anstataŭ "kiu", konkretajn, pripersonajn informojn (ekz. pri malsanoj de politikistoj ktp.).

H.M. Maitzen

ENKETO PRI LA 70a UK

Mankis sufiĉaj eblecoj por aktiva partopreno

Entute 142, t.e. apenaŭ 7% de la partoprenintoj de la 70a Universala Kongreso en Aŭgsburgo redonis la enketilon. La kialo de tiu magra rezulto verŝajne estas tute simpla: oni ne trovis la ujon, en kiun meti la respondilon. Eble ankaŭ la amplekso de la enketilo fortimigis multajn; ĝi ja havis 96 demandojn sur kvar paĝoj.

Ne havas sencon prezenti mezajn poentojn asignitajn al unuopaj kongreseroj. Kelkaj ciferoj tamen

estas interesaj, se oni komparas ilin kun la enketo pri la UK en Vankuvero. Dum la seksa distribuo de la vankuveraj respondintoj estis egala, inter la aŭgsburgaj **superregas viroj** kun 64%. Ĝojigas la diferenco de la aĝo. Plimulto de la vankuveranoj estis pli ol 60-jaraj, dum en Aŭgsburgo ĉi tiuj konsistigis nur 31%. Tion notis kongresano, kiu pravigis sian kontenton ĝuste per tio, ke en Aŭgsburgo estis **"pli juna kaj vigla partoprenantaro**, speciale kompare al Hamburgo". Unu diferencon disde la rezultoj de la pekina enketo eblas antaŭvidi jam nun. Se 90% de la ĉi-fojaj respondintoj estis el Eŭropo kaj nur 3% el Azio, venontjare oni konstatos ion tute alian.

La **kleriga programo** estis alte taksata, precipe la Esperantologia Konferenco, Internacia Kongresa Universitato kaj la traktado de la kongresa temo. Apartajn laŭdojn rikoltis la gvidantoj de la du lastaj eroj, respektive Helmar Frank kaj William Auld, dum pri la rango de la plej ŝatata IKU-preleginto konkuris Humphrey Tonkin kaj Amri Wandel.

Ŝajne la kongresanoj, kiuj interesiĝas pri klerigaj eroj, interesiĝas ankaŭ pri evoluigo de la kongresoj. Tial ili emas pli aktive respondi al la enketo ol tiuj, por kiuj la kongreso estas unuavice turisma aŭ distra okazaĵo. Tion eblas konkludi ekz. el tio, ke eĉ 54% de la respondintoj vizitis IKU-prelegojn (meze 2,8 prelegojn). Tiu ĉi proporcio neniel validas por la tuta kongresanaro.

Senentuziasmaj oni estis pri la Inaŭguro kaj Malfermo. Oni plendis pri netaŭgeco de la Sporta Halo kaj pri la programo, kiun oni sentis teda pro **klišaj**



paroladoj kaj salutoj. Sed kiel apliki al ili – kiel postulis iu – la kongresan temon "Kion konservi, kion ŝanĝi"? Kaj kial la Fermo gajnis bonan takson, kvankam ĝi konsistis preskaŭ nur el paroladoj? Ĉu la pli komforta salono kaŭzis tion?

Pri sia **loĝejo** preskaŭ ĉiu kontentis, dum **ekskursoj** estis tre kritikataj. Jen ĝi komenciĝis pli malfrue ol anoncite, jen ĝi daŭris nur duonan tempon, jen oni vizitis nur parton de la lokoj. Evidente ĉi tiu servo devos esti pli zorge plenumita en la estonteco. Ĉar oni aparte pagas por ekskursoj, oni rajtas je adekvataj servoj.

La **kongresa kuriero** plaĉis al ĉiu. Ankaŭ pri la aliaj presaĵoj oni ĝenerale kontentis, kvankam la koncernaj respondoj havas multe da sugestoj, kiuj estos konsideritaj. Bedaŭrinde malmultis proponoj, kiel evoluigi la **Interkonan Vesperon**. Tre multaj plendis, ke ĝi havas nenion komunan kun sia nomo. Eble indos provi enkondukan "lecionon" por unuafojaj kongresanoj, kiel iu proponis. Kvankam ĝi ne interkonigus, ĝi helpus orientiĝi en la kongresa ĝangalo.

Valora kaj ofta plendo estis, ke **ne restis tempo por diskuti** post prelegoj, pro kio la aranĝoj tro similis disciplinon en malnova lernejo. (Disciplinon oni tamen postulis por meti finon al la ĝena en- kaj eliro dum prelegoj, prezentadoj ks.). Junaj kongresanoj insistas, ke la programo prezentu pli da eblecoj por aktiva partopreno de la publiko, aŭ kiel klare vortumis unu el ili:

"La programo estis tute pasiva kaj preskaŭ tute parola. La Junulara Vespero montris, ke multaj ŝatas partopreni ion... Programeroj, en kiuj oni fakte faras ion – verkas poemojn, skribas al registaro, faras afiŝon, skribas leterojn al afrikaj esperantistoj, fotas ktp. – estus tre bonvenaj. Kial ni ne uzu la homamason por produkti ion? Multo farendas por 1987 kaj poste. Kun iom da organizo parto el tiuj 2 300 ĉeestantoj povus fari utilan kontribuon."

Osmo Buller

REAGOJ

Nepre ripetinda

Aplaŭdinda iniciato estis la Kultura Esperanto-manifestacio sur la urba placo de Aŭgsburgo merkredon la 7an de aŭgusto de la 14a ĝis la 17a horo por diskonigi la Esperantan kulturon al eksteruloj. La bela vetero ĝin favoris. Ĝi logis proksimume mil loĝantojn de la urbo kaj vekis grandan eĥon en la gazetaro. La programo konsistis ĉefe el kantoj Esperantaj, kantataj de la Internacia Ĥoro, gvidata de Dimitr Terziev. Ĝi vekis favoran impreson: multaj homoj pro ĝi vizitis la kongresejon kaj esprimis la deziron lerni Esperanton. La programon mi dezirus iom alia, sed kiel propagandilo ĝi estis tre sukcesa kaj nepre ripetinda en sekvontaj kongresoj.

W.A. Verloren van Themaat (Nederlando)

Monumenta verkaĵo de altnivela erudicio

Biblia vortaro, komp. H. Paruzel, E. Wojtakowski k.a. Romo: Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj (IABO), 1984. 415+17p. Ilus. 22cm. Bind. Prezo: 69,00 gld.

Ĉi tiu estas granda kaj grava libro, unika en sia speco. Ĝia valoro kiel informilo por serioza studanto de la Biblio estas nekalkulebla.

Sur la titola paĝo staras la vortoj "*Biblia vortaro* sub la direkto de H. Paruzel kaj E. Wojtakowski". Sube estas la dato 1975. La iniciatinto de la entrepreno estis la prezidanto de IABO, prof. Angelo Duranti. Li verkis la Konkludon (en 1984), kaj en ĝi li diras, ke en 1975 li verkis la Antaŭparolon, kaj ke tiutempe kunlaboris por la redaktado de la libro tiuj du poloj, sed ke, laborinte dum du jaroj, pastro Paruzel estis mortigita en aŭtomobila akcidento, kaj ke prof. Wojtakowski ne plu povis daŭrigi la entreprenon. La laboro jam atingis la literon M. Do, li devis serĉi aliajn kunlaborantojn. Li trovis kelkajn, sed unu post la aliaj ili mortis. Nur komence de 1982 li trovis la italajn monsinjoron J. Lanzoni kaj pastron R. Di Prinzio, kiuj konsentis kunlabori super la restantaj preskaŭ mil terminoj. Ili tiel sin dediĉis al la tasko, ke ili finis ĝin, ankaŭ tajpis la neton por la presisto, en 1984.

En la antaŭparolo Duranti mencias la kvar jam ekzistantajn nekompletajn bibliajn terminarojn; ili faris kontribuojn al la Vortaro. Li parolas ankaŭ pri la motivoj, kiuj instigis lin iniciati la preparan laboron por la eldono de vortaro enhavanta ĉiujn notindajn nomojn en la Biblio – nomojn de personoj, bestoj, objektoj, okazaĵoj kaj temoj. La libro estu utila al kleruloj kaj nekleruloj. La klarigoj de la terminoj enhavas ĉiujn necesajn bibliajn referencojn, do, la libro povas esti uzata kiel speco de konkordanco. La nomoj estas aranĝitaj en alfabeta ordo kaj en du kolumnoj sur ĉiu paĝo. La kolumnoj estas numeritaj de 1 ĝis 830. Je la supro de ĉiu paĝo estas indiko de ĝia enhavo. Do, la libro estas facile uzebla.

La Vortaro estas pleje rom-katolika entrepreno, sed oni celis, ke ĝi estu tute ekumena. Ĝi ja estas. Tie, kie estas diferencoj inter katolikoj kaj protestantoj ĉe kredoj kaj tradicioj, ili estas juste indikitaj sen ia tendenceco. La klarigoj de bibliaj temoj estas tute ortodoksaj; ili informas nur tion, kion la Biblio mem diras – kun maloftaj esceptoj – sen pritrakto de "modernaj" kritikaj teorioj. Estas aludo al unu el ili en kolumno 312 sub la vorto "Genezo", kie oni legas: "Nuntempaj ekzegezistoj vidas en ĝi 3 fontojn (J, E, kaj P)" sen klarigo de la literoj. Por rom-katolikoj kaj aliaj, la Apokrifo estas deŭterokanona, do en la Vortaro ĝiaj libroj estas pritraktitaj samnivele kiel tiuj de la Biblio.

Tra la Vortaro nomoj de viroj havas la finaĵon -o, kaj nomoj de virinoj havas la finaĵon -a. Tio ŝajnas esti iom pedanta kaj tute ne necesa. Kial IABO ne sekvis la bonegan ekzemplon de Zamenhof, kiu en sia traduko de la Malnova Testamento kaj aliloke, ne uzis finaĵon ĉe personaj propraj nomoj, krom ĉe tre malmultaj kiel Moseo kaj Josuo? (Tamen li uzis la akuzativon -on.) En la Vortaro oni uzis la formon "Saŭlo", eble kiel paralelo kun "Paŭlo", sed ili ne estas paralelaj. La *aŭ* en "Paŭl" estas latina diftongo, sed la hebrea *Ŝa'ul* estas dusilaba pasiva participo (petita), do oni devus prononci la du vokalojn aparte. Zamenhof montras tion per sia formo "Saul".

Kelkaj ekzemploj de nekutima (neinternacia) stilo: Kolumno 8: *Abimeleĥ'* "... Davido ŝajnigis frenezulon"; 90: *Aŝtara* "Ŝi estis loka varianto de konata en tuta Proksima Oriento diino"; 576: *Laodikeanoj* "Oni ne scias ĉu temas pri konata ekde la 4 jc. 20 versa samnoma pseŭdepigrafiaĵo,..."; 787 *Ŝimŝono ... perdis lin la amo de Delila* devus esti "pereigis".

Sub *Apokalipso*: "..., kies aŭtoro estas s-ta Johano la Apostolo." Tio estas tradicio; la Biblio mencias iun Johanon, sed ne diras kiun. Kelkaj kleruloj opinias, ke la aŭtoro estis iu Johano, kiu estis membro de la presbiteraro menciita en 1 Tim. 4:14. Alia teorio estas donita en kolumno 472 sub la dua *Johano*, kie estas dirite, ke la Apokalipso estas "pseŭdepigrafia libro" de la Nova Testamento, kaj ke ĝia aŭtoro estas nekonata.

Tra la libro la formo "Javeo" estas uzata, kaj sub *Javeo* en kol. 433 estas kategorie asertite, ke ĝi estas la propra nomo de la Dio de Izraelo. Tio estas bedaŭrinda, ĉar multaj kleraj studantoj de la Biblio bonkiale forte malkonsentas tian aserton. Krome, la sola uzado de tiu vorto ŝajnas esti pedanta, kaj nenecesa. Kial ne uzi la simplan kaj sufiĉan vorton "Dio"?

Rimarkitaj preseraroj: 10 *Abiŝaĝ* devus esti "Abiŝag" (dufoje); 108 *respondecas* devus esti "respondas"; 716 *jugo* devus esti "juĝo"; 782 ĉe Ŝeŝajo: *raco* devus esti "raso".

Biblia vortaro estas monumenta verkaĵo, kiun generacioj da studantoj uzados kun plezuro kaj kontento, ne nur pro tio, ke ili trovos ĝian enhavon ampleksa kaj utilega, sed ankaŭ pro tio, ke ili sentos en ĝi la aŭtoritaton de altnivela erudicio. Ĉiuj esperantistoj rajtas esti fieraj pri la ekzisto de tia libro en nia internacia lingvo.

Ni memoru, ke sen la nobla kaj persista sindediĉo de profesoro Angelo Duranti kaj liaj helpantoj ni ne

havus ĉi tiun elstaran libron. *Biblia vortaro* gajnu la sukceson, kiun preter dubo ĝi meritas.

W.J. Downes (Britio)

Pli ol sciencpopulariga

Matematiko, instruado de matematiko kaj komputotekniko, Ilona Koutny. Budapeŝto: NJSZT, 1982. 172p. (+ ĉ. 40 paĝoj da anoncoj). 24cm. Mimeo. ISBN 963 8431 27 X. Prezo: 18,00 gld.

Al la Internacia Komputoscienca Simpozio, Interkomputo '82, kiu okazis en Budapeŝto (vidu *Esperanto* 1982: p.107 kaj 1983: p.3-4), estis senditaj preskaŭ cent kontribuaĵoj el dek kvar landoj. Naŭdek estis elektitaj por prezentado, kaj ties tekstoj aperis jam antaŭ la simpozio, laŭteme kolektitaj en ses volumoj: la jena enhavas dek unu artikolojn sub la rubriko Matematiko, kaj ok sub Instruado de matematiko kaj komputotekniko.

Nesolveblajn ĉifrojn oni povas fabriki surbaze de elementaj nombroteoriaj konsideroj, kaj Tamás Iván cerbumige montras al ni kiel.

En du kontribuaĵoj A.A. Gofen interesveke prezentas metodon taksi la eraron dum nombra integrado de diferencialaj ekvacioj, kaj ordinaraj kaj parcialaj. Reinhard Fössmeier donas legindan superrigardon de plurkradaj metodoj por solvi parcialajn diferencialajn ekvaciojn.

La simpleksa metodo estas kutima solvmetodo en la lineara programado (optimumiko), kiu tamen kelkfoje povas estigi nefinian maŝon. Surbaze de kritiko de tiu metodo, A.I. Ačildiev prezentas alian metodon de solvado, trovante t.n. normalan problemon ekvivalentan al la donita.

Matrico nomiĝas Toeplitz-a, se ĝiaj elementoj estas konstantaj laŭ ĉiu diagonalo. La problemon pri efika inversigo de tiaj matricoj studas György Beck en sia kontribuaĵo.

La lasta artikolo en la primatematika parto, verkita de Tibor Balogh, prezentas komputilan programon por ordigi "la magian kubon" (plej ofte nomatan "la hungara kubo").

La priinstruan parton enkondukas J. Marević, demandante ĉu la lernejo kaj la moderna tekniko disiras. Laŭ enketo farita en Zagrebo en 1981 ekzistas grandaj diferencoj inter la opinioj de la lernantoj kaj tiuj de la instruistoj pri i.a. komputila instruado, kaj ĝenerale pri noviĝoj en la didaktiko. "Ju pli malmulte da novigoj alvenas, des pli bone kaj senzorge oni povas vivi" (p.107). "La enketo montras, ke la instruistoj postiras en siaj observadoj kaj juĝoj pri la kleriga teknologio, precipe pri la komputilo, [kompare al tiuj] de la lernantoj." Sed: "Oni povas atendi, ke la situacio ŝanĝiĝos favore al la modernigo de la nuna lernejo" (p.109).

József Németh prezentas tri komputilajn programojn, kiujn li uzis kiel helpilon en la matematika instruado: temas pri programo por ekzercigi la adician operacion en laŭplaĉa cifersistemo kaj pri du programoj por evoluigi la kapablon taksi areojn. La celo certe estas grava: kunigi la grafikajn kaj nombrajn aspektojn de la operacioj.

Gábor Mikes donas superrigardon de la studprogramoj de la hungaraj ekonomikaj kaj komputoteknikaj mezlernejoj; Elemérné Nagy de tiu de la Nutraĵindustria Altlernejo.

Zoltán Kovács entuziasme raportas pri sia multflanka esploro pri la kvadrataj nombroj: la sumoj de du kvadratoj kaj la pitagoraj triopoj. Malfacilaj taskoj aktivigas la gelernantojn. Ĵetu ilin ofte en profundan akvon! "Trovu la plej malgrandan cirklon, kiu trapasas cent entjerajn punktojn!"

Halima Ejsmont raportas pri la mezlerneja instruado de informadiko en Pollando. Ne eblas ne citi el ŝia artikolo: "Senduba fakto estas, ke tiel nomata informatika pensmaniero, kiu estas altrudata al homo per neceso konvene fari taskojn kaj [adapti] metodojn kaj solvojn al la eblo de komputilo – konvenas al celkonscia, bone organizita kaj sukcesa agado de la homo en ĉiuj agadsferoj" (p.160). Ĉu vere ĉiuj?

La lingva nivelo de la tekstoj ĝenerale estas tute kontentiga, sed en kelkaj lokoj iom ĝenas foresto de difinaj artikoloj.

Kvankam mi ne menciis ĉiujn kontribuaĵojn, la leganto espereble videtis la diversecon de la volumo. Parto de ĝi estas tro altnivela por aparteni al la sciencpopulariga literaturo. La kolekto tamen ĉiom atestas pri la vivopovo de Esperanto kiel science uzebla lingvo.

Christer Kiselman (Svedio)

Elstara informilo

Ne nur leteroj de plum-amikoj; Esperanta literaturo – fenomeno unika, Marjorie Boulton (1924). Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1984. 63p. 20cm. ISBN 91 85288 063.

Tio, kio plej elstaras en ĉi tiu libreto de Marjorie Boulton estas ŝia honesteco. Pro sia sincere sentata pasio pri literaturo ŝi celas prezenti al la leganto superrigardon pri la Esperanto-literaturo tia, kia ĝi efektive estas. Ŝi ne naive laŭdas ĝin nek provas doni impreson, ke temas pri enorme grandskala verkaro, sed tutsimple atentigas, ke malgraŭ la antaŭjuĝaj supozoj de multaj, Esperanto-literaturo ja ekzistas kaj ja enhavas verkojn, kiuj vere atingas internacie rekonatan nivelon de beletra kvalito.

Ŝi donas laŭĝenran literaturhistorian skizon kaj poste prezentas etan aron da priskriboj de tiuj verkoj kaj aŭtoroj, kiujn ŝi persone estimas aŭ kiuj pro iu alia kialo meritas mencion. Fona konstatendaĵo, pri

kiu ŝi jam de la komenco atentigas, estas la unikeco de la esperantista verkisto kaj ties situacio kaj verkoj. Aŭtoron, kiu Esperante verkas, povas instigi nur amo. En la aktualo tiu ne povas verki profesie, kaj plejofte eĉ malprofitas de siaj Esperantaj eldonoj, sed tamen sukcesas produkti verkojn mirakle altkvalitajn. Tia sindediĉo estas fenomeno en si mem estiminda.

La libro celas ne nur komencantojn, kiuj volas elturniĝi en la gamo de la Esperanto-literaturo, sed ankaŭ neesperantistojn, kiuj ankoraŭ ne scias pri la unikaĵo. Laŭ tiu celo, do, oni efektive traduku ĝin nacilingven, ĉar ĝuste libreto tia ĉi, montrante la ekziston kaj viglon de Esperanto-kulturo, kapablas gajni la estimon ĉe tiuj intelektuloj, kiuj emas primoki nian lingvon kiel esprimomankan, senvivan, baznivelan piĝinon. Estus plorinda malŝparo de elstare varbopova informilo, se la libro restus nur inter ni esperantistoj pro manko de tradukopretaj kaj tradukokapablaj homoj.

Graham Cansdale (Britio)

Laste aperiŝ...

Anaseto kaj koketo, adaptis Hŭang Ĝunŭan. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 27p. Kolorilus. de Ĉu Ĉŭan. 19cm. Tri rakontoj por junaj infanoj. Prezo: 2,40 gld.

Biografia leksikoneto de la japana Esperanto-movado, Tanaka Sadami, Mine Yositaka, Miyamoto Masao. Ôsaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1984. 120p. 18cm. Japanlingva konsultlibro. Prezo: 11,70 gld.

Cás do Esperanto, An, Liam Ó Cuirc. Dublino: Esperanto-Asocio de Irlando, 1984. 5p. 21cm. Irlandlingva informilo: "La argumento por Esperanto". Prezo: 1,50 gld.

Computer Dictionary, English-Esperanto (draft), red. Christian Bertin (1949). Cesson-Sévigné (Francio): la redaktoro, 1985. 106p. 21cm. "Malneto" de angla-Esperanta vortaro kun 3 800 terminoj; kun tabeloj, klarigoj kaj listo de mallongigoj. Prezo: 18,00 gld.

Duagrada kurso de Esperanto/Tu' hoc trung câp quôc tê ngũ Esperanto, Nguyên Công Môn k.a. Xuât Bán/Budapeŝto: Hôi Quôc Tê Ngũ Bao Vê Hòa Bình/Hungara Esperanto-Asocio, 1983. 107p. Ilus. 20cm. ISBN 963 571 097 6. Informaj artikoloj en la vjetnama, gramatikaj klarigoj kaj vortlistoj Esperantaj-vjetnamaj. Prezo: 9,00 gld.

Esperanto, lingvo por ĉiuj/Una lengua para todos (1974), F. Zaragoza Ruiz. Callosa de Segura: Colegio Público, 1985 ne indikita (2a eld.). 48p. 24cm. Kursa lernolibro 21-leciona por infanoj 10- ĝis 12-jaraj, laŭ perfraza metodo. Prezo: 8,10 gld.

Familio de Pascual Duarte, La (1942), Camilo José Cela (1916). El la hispana trad. F. de Diego. Barcelono: Barcelona Esperanto-Centro, 1985 (ne indikita). 167p. Ilus. de Joan Carles Magria. 18cm. ISBN 84 398 3623 6. Konata romano pri homaj instinktoj kaj pasioj de nuntempa hispana verkisto. Prezo: 18,00 gld.

Germana antologio (ekde la plej frua epoko ĝis ĉ. 1700). El la germana trad. W. Hermann kaj H. Rössler; red. O. Brecht. Gerlingen: Eldonejo Bleicher, 1985. 327p. Ilus. 19cm.ISBN 3 88350 503 X. Impona kolekto de tradukoj el la Frugermana epoko, La tempo de la karolidoj kaj otonidoj, La tempo de la trobadoroj, La malfrua mezepoko, Renesanco kaj humanismo, La Reformacio, La Baroko; kun enkonduko al ĉiu sekcio. Prezo: 31,50 gld.

Historio absolvos min, La, Fidel Castro (1927). El la hispana trad. Kuba Esperanto-Asocio. Havano: Eldonejo José Marti, 1984. 62p. 21cm. Fama parolado farita en la proceso Moncada kaj farigînta programo de la kuba revolucio. Prezo: 4,20 gld.

IFEF-historio 1909-1984. Lindhorst (FR Germanio): Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, 1984. 80+folio. Ilus. 22cm. Aŭtoritata, riĉe ilustrita kaj detala historio pri la fervojista Esperanto-movado. Prezo: 6,00 gld.

Lidia; The Life of Lidia Zamenhof; Daughter of Esperanto, Wendy Heller. Oksfordo: George Ronald, 1985. 260p. Ilus. 24cm. ISBN 0 85398 194 9. Aŭtoritata anglalingva biografio pri Lidia Zamenhof (1904-1944), filino de la iniciatinto de Esperanto; kun 60 ilustraĵoj; fontoregistro kaj indekso. Prezo: Bind. 78,00 gld.; broŝ. 36,00 gld.

Liza kaj Paŭlo; Sondramo por stimuli la studadon de Esperanto (1984), Reto Rossetti (1909). Teddington (Britio): Grupo Kvin, 1985 (3a reviziita eld.). 12p. Ilus. de Peter Oliver. 21cm. Lingve kaj grafike rekomendinda bildstria rakonto por ĵus komencintoj; kun poemoj kaj kantoj; aparta kaseto. Prezo: libreto 2,70 gld.; kaseto 15,00 gld.

Lingvaj aspektoj de Esperanto, Bruno Migliorini (1896-1975). Pisa: Edistudio, 1985. 93p. 22cm. Bind. ISBN 88 7036 033 9. Sep eseoj de konata lingvisto pri esperantologiaj kaj interlingvistikaj temoj. Prezo: 24,00 gld.

Maks kaj Morits; Knaba rakonto en ses bubaĵoj (1864), Wilhelm Busch (1832-1908). El la germana trad. Rudolf Fischer. Bad Hersfeld: Deutscher Esperanto-Bund, 1985. 34p. Kolorilus. 19cm. ISBN 3 88547 273 2. Amuza, klasika, abunde ilustrita poemo por infanoj, de unu el la fondintoj de la germana bildstria arto; kun biografio pri la aŭtoro kaj apendico kun la germana kaj Esperanta tekstoj apudmetitaj. Prezo: 14,40 gld.

Mia spektro (1938), Nikolao Kurzēns (1910-1959). Toronto: Esperanto-rondo, 1985 (2a eld.). 131p. Ilus. 19cm. ISBN 09 9186 27 0. Nikolajs Kurzēns estis poeto de la pesimismo, "maj-

Kompletigu vian kolekton de

Esperantologio

Ankoraŭ haveblas n-roj 1, 2 kaj 3 de vol. 1 kaj n-ro 2 de vol. 2. Ĉiu numero kostas 12 gld. plus sendokostoj. Mendu ĉe Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

stro de la eta formo". Krom la 59 poemoj de la originala eldono, aldoniĝis ceteraj verkoj de Kurzēns: 38 poemoj tradukitaj de li el la latva kaj naŭ liaj latvalingvaj poemoj en Esperanto de Elvira Lippe; kun enkonduko de William Auld kaj biografiaj vortoj de Mirdza Burgmeister. Prezo: 13,50 gld.

Naturo kaj socio; Enkonduko en ekologian pensadon kaj agadon (1984), Edgar Guhde (1936). El la germana trad. W. Gunther, C. Noll, G. Grunder. Paderborn: Esperanto-Centro, 1985. 169p. 21cm. ISBN 3 922570 40 2. Didaktika prezento de la politika ekologio: la rilatoj inter la industrisocio kaj naturmedio, i.a. per resumoj, demandoj kaj taskoj; kun glosaro kaj bibliografio. Prezo: 22,50 gld.

Ni parolu Esperanton kune, Charlotte Kohrs. San-Diego: La Tigro, 1984. 44p. Ilus. 28cm. Moderne produktita enkonduka lernolibro 16-leciona kun dulingvaj interparoloj; uzebla ankaŭ kiel konversacia suplemento al aliaj kursoj. Prezo: 15,90 gld.

Novaj distraĵoj kaj amuzaj eldiraĵoj (1558), Bonaventure des Périers (16a jc.). El la franca trad. Hervé Gonin (1947). Parizo: Unuiĝo Franca por Esperanto, 1985. 56p. 21cm. Speciala literatura numero de *Franca esperantisto*, n-ro 363. Mallongaj rakontoj pri la vulgara vivo en tiama Francio. Prezo: 6,90 gld.

Nudpieda Gen, Nakazawa Kiezi. El la japana (1982) trad. Izumi Yukio. Tokio: Rondo Gen, 1985 (2a eld. reviziita). 4+284p. 21cm. Bildstria romano pri familio, kiu spertis la eksplodon de la atombombo super Hiroŝimo en 1945. Unu el la plej famaj kontraŭmilitaj libroj en Japanio, kie ĝi estas ankaŭ filmita kaj operigita. Bele eldonita, ĝis nun la plej ampleksa bildstria libro en Esperanto; Esperanta Infanlibro de la Jaro 1983. Prezo: 30,00 gld.

Okayama no esuperanto, Oka Kazuta (1904). Okayama: Nippon Bunkyô Syuppan KK, 1983. 173p. Ilus. 15cm. Serio: Okayama Bunko. Japanlingva historio de Esperanto en la gubernio Okayama de 1903 ĝis 1945. Prezo: 18,30 gld.

Patroj kaj filoj (1862), I.S. Turgenjev (1818-1883). El la rusa trad. (1909) Kazimierz Bein (Kabe). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 215p. 18cm. Klasika romano de fama rusa verkisto. Prezo: 12,00 gld.

Per la fido; Meditaĵoj pri la biblia ĉapitro Hebreoj 11, Gideon Ekström. El la sveda. Hallsberg (ne indikita): Esperanto-Misio, 1985. 72p. Mimeo. 21cm. Prezo: 9,00 gld.

Pledo por unueca lingvo, Rikardo Ŝulco (Richard Schulz, 1906). Paderborn: Esperanto-Centro, 1985. 287p. 21cm. Bind. ISBN 3 922570 42 9. Artikoloj, eseoj, recenzoj, leteroj ks. pri la lingvouzo de Esperanto. Prezo: 55,80 gld.

Postrikolto de ludovikajoj. Iam kompletigota plena verkaro de L. Zamenhof, kajero 10. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1985. 307p. 22cm. Bind. Skribaĵoj, ĉefe leteroj, de kaj al Zamenhof, transskribitaj (kun unu faksimilio); indekso. Prezo: 48,00 gld.

Sciencaj komunikaĵoj 1985/2; Ter-sciencoj, red. András Lukács. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro, 1985. 96p. Ilus. 24cm. N-ro 9. Sciencaj artikoloj i.a. pri paleografio, tertremoj, arkeologio, zoogeografio, astronomio kaj minado. Prezo: 9,00 gld.

Sciencaj komunikaĵoj 1985/3; Komunikado, red. András Lukács. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro, 1985. 96p. Ilus. 24cm. N-ro 10. Sciencaj artikoloj pri lingva komunikado, perkomputilaj tradukado kaj tekstoprilaboro, edukado kaj la homa cerbo, radiofrekvencaj kabloj kaj dentrada transmisio. Prezo: 9,00 gld.

39 modernaj poetoj; Antologio de la postmilita bosnia-hercegovina poezio, komp. Ivan Kordić. El la serbokroata trad. Ladislav Režek. Sarajevo: Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1985. 110p. 20cm. Okdek naŭ poemoj de 39 poetoj; kun antaŭparolo kaj notoj pri la aŭtoroj. Prezo: 13,50 gld.

Trojaninoj; Ifigenia en Taŭrido, Eŭripido (ĉ. 480-406 a.K.). El la pragreka trad. Albert Goodheir (1912). Glasgovo: Eldonejo Kardo, 1985. 134p. 21cm. ISBN 0 905149 22 X. Du tragedioj, traktantaj la okazaĵojn, kiuj sekvis la militon de la grekoj kontraŭ Trojo; kun enkonduko kaj notoj. Prezo: 17,40 gld.

Tu' hoc quôc tê ngũ' Esperanto; So' câp và Trung câp, Nguyên Minh Tung k.a. Budapeŝto/Xuât Bán: Hungara Esperanto-Asocio/Hôi Quôc Tê Ngũ' Báo Vê Hòa Bình, 1983. 255p. 20cm. ISBN 963 571 098 4. Baza lernolibro 17-leciona por vjetnam-lingvanoj, kun gramatikaj klarigoj, ekzercoj, konsiloj pri stilo kaj ekzemploj de literaturo. Prezo: 15,00 gld.

Verda estonteco, La (1978), Harry Harrison (1925). El la angla trad. Joy Davies. Dublino: Esperanto-Asocio de Irlando, 1984. 15p. 21cm. Sciencfikcia novelo pri imagita estonteco de Irlando. Prezo: 3,00 gld.

Vi devas esti denove naskita, J. Nyrud. El la sveda. Hallsberg (ne indikita): Esperanto-Misio, 1984. 54p. Mimeo. 21cm. Kristana religia traktaĵo. Prezo: 6,00 gld.

Diversajoj:

Ludo de Pinokjo, La. Ludo kun kolorilustritaj kartoj por 2, 3 aŭ 4 personoj, surbaze de epizodoj el la fama infanlibro *Pinokjo*. Prezo: 10,50 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

TEJO-paĝo

Kontribuojn sendu al la ĝenerala sekretario de TEJO: N. Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna.

Pli malaltaj kotizoj por la 42a IJK

Dum la Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Eringerfeld multaj personoj esprimis sian deziron partopreni en la venontjara IJK en Neurim, Israelo (14-21 aŭgusto), sed dubis pri sia kapablo pagi la altan kongreskotizon. Por helpi al tiuj gejunuloj, la Loka Kongresa Komitato (LKK) retraktis la demandon pri la kotizo, i.a. kun la direktoro de la kongresejo, kaj decidis pri du signifaj paŝoj: 1. Malaltigi la kotizojn en la du unuaj aĝkategorioj (je 20 usonaj dolaroj por kongresanoj ĝis 21-jaraj kaj je $10 ĝis 26-jaraj), 2. Ebligi memmastrumadon, por kiu estos rabato de $80.

Ni principe kontraŭas memmastrumadon (pro la kongresa etoso ks.), sed ni decidis akcepti limigitan nombron de memmastrumantoj en junulargastejo apud la kongresejo. Ne eblos tendumi. Komparante la rabaton por memmastrumantoj kun la elspezoj por loĝado kaj manĝoj, kiujn ĉi tiuj ĉiuokaze devos pagi – ni taksas tion esti minimume $50 –, oni povas konkludi, ke la ŝparo ne estas granda. Cetere, la minimuma kotizo por memmastrumanto estas $10; ekzemple, kongresano en la plej malalta kotizkategorio, kiu rajtas je TEJO-rabato, pagos kiel plena kongresano 65 usonajn dolarojn, kaj kiel memmastrumanto $10. Se montriĝas, ke oni tro multe ekspluatas tiun kategorion, la LKK rezervas al si la rajton prioritate aprobi tiujn, kiuj ŝajne plej bezonas ĝin.



Ĉar la malnovaj aliĝiloj estis amase disdonitaj jam en Eringerfeld, necesas informiĝi pri la novaj kotizoj. Ni sekve presigis du mil novajn aliĝilojn. Ili estas haveblaj ankaŭ de la Centra Oficejo de UEA.

Jen la plena kotiztabelo en usonaj dolaroj:

aĝo je aliĝdato	aliĝo ĝis			
	15 jan 86	01 maj	01 jul	surloke
21-jara	80	100	120	140
26-jara	110	130	150	170
35-jara	140	160	180	200
pliaĝa	180	200	225	250

La rabato por Individua Membro de TEJO estas $15; la rabato por memmastrumado estas $80.

La adreso de la LKK estas: 42a Internacia Junulara Kongreso, POK 22041, IL-61220 Tel-Aviv, Israelo.

Josef Ŝemer
Sekretario-Kasisto

Amri Wandel
Prezidanto de la LKK

Gejunuloj kaptas atenton

De la 10a ĝis la 20a de julio Bulgario gastigis en Sofio infanojn el dekoj da landoj. Lumo ŝprucis el la scenejoj por recitadoj kaj koncertoj, el ekspoziciejoj kaj salonoj por renkontiĝoj de junaj teknikistoj kaj sportistoj. Plurfoje la infanoj prezentis siajn kapablojn, sed la Monda Infana Asembleo "Standardo de la Paco" ne havis konkursan karakteron.

La partopreno de la junaj bulgaraj esperantistoj en la pasinta Asembleo de 1982 tiel impresis la organizantojn, ke ili ĉi-jare oficiale invitis la junajn esperantistojn pli amase partopreni. La Organiza Komitato krome sendis inviton al la vicprezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin.

La grandan intereson pri la esperantistaj infanoj el Greklando, Jugoslavio, Hungario, Malto kaj Bulgario pruvas la tri elsendoj de la Bulgara Televido kaj la disaŭdigoj de Radio Sofio. Infanoj el Togo kaj Benino kun siaj gvidantoj ege interesiĝis pri Esperanto. Ili esprimis deziron konatiĝi kun la bela lingvo, kaj la gvidantinoj promesis raporti pri la Internacia Lingvo al siaj ministroj pri kulturo. Bulgara Esperantista Asocio siavice promesis al ili helpi en la lernado de la lingvo kaj flegi kontaktojn per Esperanto kun infanoj en Bulgario.

La Infanan Asembleon salutis pli ol 130 gravuloj kaj ok internaciaj organizaĵoj el la tuta mondo, sed la esperantistaro plej ĝojis pri la raportoj en la bulgara gazetaro kaj la telegramoj de la UEA-oficejo ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko kaj de Helena Esperanto-Asocio. Ni esperu, ke la 5an Mondan Infanan Asembleon, kiu okazos en Sofio en 1988, partoprenos ankoraŭ pli da esperantistaj infanoj el la tuta mondo.

Petâr Todorov

Loke

● **Brazilo:** Fine de julio d-ro Sylla Chaves vizitis la urbojn Itabuna kaj Ilhéus, por intense instrui Esperanton. Poste oni en Ilhéus inaŭguris buston de Zamenhof. Pro tio aperis la 1-an de aŭgusto artikolo de la prezidanto de la Esperanto-klubo en la loka ĵurnalo *Tribuna do Cacau*.

● La Esperanto-societo de Brazilio planas lanĉi diskon de nuntempaj brazilaj kantoj, originale verkitaj en Esperanto, por atingi la publikon pere de elsendstacioj. Ĝi aldone informos pri Esperanto en la portugala. Por kunlabore prepari la tekston la societo invitis Flávio Fonseca, profesia kantisto-komponisto, kies kantoj estas prezentitaj tra la tuta mondo. Oni povas antaŭmendi la diskon *Flávio Fonseca en Esperanto* de: Eo-Asocio de Brasília, CP 11-1124, BR-70084 Brasília (DF), sed bv. noti, ke ĝi estos duobla "kompakt-disko". Ĉu la unua tia disko en Esperanto?

● **Britio:** La 16an de aŭgusto 45 esperantistoj partoprenis ceremonion ekster la trinkejo "La Verda Stelo" ĉe Esperanto Way (Vojo Esperanto) en Stoke-on-Trent. William Auld pendigis florkronon super la memorŝtono pri Zamenhof en ĉeesto i.a. de Paul Neergaard kaj Marjorie Boulton.

● **Haitio:** La 17an de aŭgusto komenciĝis la dua kurso de Esperanto en la karibmara ŝtato Haitio. Ĝin gvidas haitia studento pri lingvistiko, François-Emmanuel Goutier (chez Service Météorologique National, Damien, Haitio). La unuan kurson finis 12 lernantoj, preskaŭ ĉiuj junaj. Ili poste formis la unuan Esperanto-klubon en Haitio, "Verda stelo", kontakteblan per la supre menciita adreso. Eugeniu Mustea el Svedio, kiu gvidis la unuan kurson, lastatempe vizitis la Centran Oficejon, kie li aĉetis librojn kontraŭ 345 guldenoj por la nova kluba biblioteko, al kiu UEA aldonis donacon de pliaj libroj ĝis la sama valoro.

● **Hispanio:** Dum la 45a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazis de la 5a ĝis la 9a de julio en Cartagena, oni – trovis tempon inaŭguri tri novajn stratojn "Lingvo Esperanto" – en Torre Pacheco, La Unión kaj Cartagena. La kongresa rezolucio i.a. dankas la Ministerion pri Edukado kaj Scienco pro ĝia Dekreto N-ro 2454 de la 13a de septembro 1984, kiu ebligas la instruadon de Esperanto kiel dua lingvo en la normala leciona horaro. La kongreso krome aprobis la translokiĝon de la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio al: Carreras Candi 34, E-08028 Barcelona.

● Italio: La 29an de julio okazis en Milano granda manifestacio favore al eŭropa unuiĝo, pro la kunveno de la ĉefministroj de la landoj de Eŭropa Komunumo. Pluraj esperantistoj, ankaŭ el Nederlando kaj FR Germanio, partoprenis la manifestacion. La foto montras itallingvan sloganon "Esperanto por Eŭropo".

● Kongo: Membroj de la Esperanto-grupo "Zamenhof" en Pointe Noire. La ĉemizojn kun la franclingva reklamo "Esperanto, internacia neŭtrala lingvo" desegnis la instruanto de la grupo Lourenço Capita (staranta, dua de dekstre).

● **Irlando:** Laŭinforme, la 4an de septembro aperis artikolo pri Esperanto en la prestiĝa irlanda ĵurnalo *The Irish Times* (87 mil ekzempleroj), kaj la postan tagon s-ino Máire Mullarney estis intervjuita pri la Internacia Lingvo en la irlanda televido.

● **Italio:** Ni ricevis informon, ke la nova itallingva romano de Lucia Barbagallo *La stella, la corce, la luna* (La stelo, la kruco, la luno), eldonita en Milano, mencias la Esperantan version de "La preĝo de nia sinjoro", troveblan inter alilingvaj versioj sur paneloj en kristana preĝejo en Jerusalemo. Eble ne temas pri nura mencio, ĉar oni volas traduki la romanon en Esperanton.

● Post hora diskuto pri Esperanto en loka televido kun parlamentano Giorgio Santuz, d-roj Tazio Carlevaro kaj Roberto Gusmani kaj Grupo Nova Espero el Udine de junio kunlaboras en ĉiusemajna hora programo pri kaj en Esperanto. Temas pri rektaj programoj el unu el la plej gravaj regionaj radiostacioj. La aŭskultantoj povas telefoni por demandi aŭ proponi. Pro la multaj demandoj oni komencis elsendi ankaŭ kurson de Esperanto. Ankaŭ aliaj lokaj radiostacioj montris intereson.

● **Japanio:** En la inform-gazeto *Tosyo* (Libro) de Iwanami-librejo aperis 6-paĝa artikolo de Kurisu Kei pri "Entu-

ziasmo pri Esperanto en Ĉinio". Ni ne povas informi, kio estas tiu librejo nek pri la dato de apero; nia informinto bedaŭrinde forgesis sendi al ni kopion de la artikolo.

● La esperantigo de kontraŭnuklea deklaracio de la prefektujo Kanagawa, farita de Jokohama Esperanto-Rondo, vekis vastan intereson. La japanlingva "Novaĵ-bulteno por municipoj liberaj de nukleaj armiloj" aperigis unu-paĝan raporton de la rondo. Ankaŭ la tutlanda ĵurnalo *Asahi sinbun* (7,5 milionoj da ekz-roj) prezentis la aferon. Ĝis junio la rondo ricevis 59 reagojn el 20 landoj.

● **Kongo:** Ni citas el letero de Capita Lourenço al Hans Bakker, komisiito de UEA pri afrika agado: "La kurso, kiun mi kaj Sumbo estis donantaj, finiĝis jam antaŭ monato, sed ne ni finis ĝin, sed Capita Auguste. Instruante oni lernas,... kaj tiu fakto ravis min kaj Auguste. Sed la vera kursejo restas la hejmo de Jean-Pierre, kiu matene kaj posttagmeze devas alfronti legion da lernemuloj: unu finas, alia komencas, tial oni ne povus aserti, ke lia unua kurso finiĝis kaj komenciĝis alia. La klubo ne plu kunvenas ĉiusemajne, sed ĉiun duan semajnon. Ĉiu klubano donas la ekvivalenton de 4 francaj frankoj monate. Eble sabaton ni festetos por tiuj, kiuj finis sian kurson..."

● **Hungario:** Somera Esperanto-Universitato en Gyula ĉi-jare allogis cent universitatanojn el 12 landoj plus 60 gejunulojn.

● **Sovetunio:** La Estona Filio de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj regule

aranĝas solenan lingvan konkurson pri la Internacia Lingvo por la respubliko Estonio kaj renkontiĝojn por lernantoj. Ambaŭ okazis ĉi-jare la kvaran fojon. Por la konkurso oni eldonis specialan orkoloran medalon el metalo kun bareliefo de Zamenhof.

● La 6an de aŭgusto aperis en la loka estona ĵurnalo *Harju elu* 250-vorta informo kun foto pri renkontiĝo en Kose, kiun partoprenis esperantistoj ankaŭ el Latvio, Litovio kaj Leningrado.

Fotis Jovan Ošap

● **van Wijngaarden: En la Solena Fermo de la 70a Universala Kongreso en Aŭgsburgo, s-ino Sija van Wijngaarden, kiu en julio emeritiĝis post 28-jara laboro en la Centra Oficejo de UEA, ricevis de la prezidanto de UEA, s-ro Grégoire Maertens (dekstre), tri bukedojn da floroj – unu por ĉiu komencita jardeko. La Estraro donis al Sija el la pensifondaĵo de UEA dumvivan partoprenon en ĉiu UK.**

● **San-Marino:** La 12an kaj 13an de septembro en San-Marino oficiale registriĝis Akademio Internacia de la Sciencoj, kies celo estas starigi internacian universitatan strukturon en tiu malgranda respubliko. Por ebligi tiukadre internacian sciencan kunlaboron, laborlingvo de la Akademio estas Esperanto. La venonta sesio okazos inter la 27a de decembro 1985 kaj la 4a de januaro 1986 kun universitataj kursoj, prelegoj kaj kolokvoj. Ekde la venonta jaro, la Akademio ebligos magistriĝon kaj doktoriĝon, oficialigitajn de la san-marina ŝtato. Interesitoj skribu al la provizora sekretariejo de AIS, Institut für Kybernetik, Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn, FR Germanio.

Fake

● **Agrikulturo:** La Agrikultura Ekspozicio de Germana DR en Leipzig-Markleeberg komence de 1986 eldonos unuafoje en Esperanto multkoloran afiŝon pri agrikulturo. La du-paĝa afiŝo ekestas per kunlaboro de esperantistoj en Leipzig kaj estos senpage havebla en du mil ekzempleroj. Se estos multaj mendoj, oni pripensos eldonon de pliaj presaĵoj en la Internacia Lingvo. Eblas jam nun mendi, uzante Esperanton: Agrikultura Ekspozicio de GDR, Raschwitzer Str. 11/13, DDR-7113 Markkleeberg, Germana DR.

● **Bendoj:** Iu sendis al ni pakaĵon de travidebla riparbendo de la registrita marko BVA kaj demandis, de kie ĝi venas, ĉar krom surskribo en la angla, germana, franca, araba, itala, hispana kaj rusa, ĝi havas tion ankaŭ en Esperanto. Pli ni ne sukcesis malkovri.

● **Klerigado:** Malgranda sed prestiĝa internacia konferenco pri "Internaciaj aspektoj de plenkreskula klerigado: Lingvo kaj internacia kompreniĝo", kun Esperanto kiel la ĉefa laborlingvo, okazis en Barlaston, Anglio, de la 17a ĝis la 23a de aŭgusto. Ĝi vekis konsiderindan intereson en neesperantistaj medioj. Oni esperas eldoni grandan parton de la konferenca materialo. La Ĝenerala Direktoro de Unesko sendis salutan telegramon.

● **Ruĝa Kruco:** La 26an de julio la belga ĵurnalo *Het Volk – DNG* (La popolo, 200 mil ekzempleroj) informis, ke 70 gejunuloj el 11 eŭropaj landoj ren-

● **M'Bow: La Ĝenerala Direktoro de Unesko, s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, kaj s-ino Isobe Yukiko, direktoro de JEI, ĝojis revidi unu la alian okaze de la bonveniga kunsido por li, okazigita de Japana Federacio de Unesko-Asocioj, dum lia vizito al Tokio en la lasta aprilo. Tiam li venis al Tokio por partopreni en "La Tago de Unesko" de Monda Ekspozicio de Scienco, pro invito de la japana registaro.**

kontiĝis sub la angla slogano "Encounter Flanders Youth '85" (Renkontu flandran junularon). Sed la tradiciaj "tagoj de internacia amikeco" ne estas tiel amikaj, ĉar "estas kontraŭregule paroli alian lingvon, ol la anglan, por esti afablaj al danoj, francoj k.a."! Ŝajne ankaŭ la flandra ruĝa kruco bezonas resanigon.

● **Parlamenta agado:** Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo ĝis aŭgusto havis 41 membrojn-eŭropajn parlamentanojn: 18 el Britio, 8 el Italio, 7 el Belgio, 3 el FR Germanio, 3 el Nederlando kaj po unu el Francio kaj Irlando.

● **Ŝercoj:** Libron kun la labortitolo *Mil ŝercoj el la tuta mondo* preparas Slavko Šimunić, Creska 18, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio, kiu petas kontribuojn de po dek altkvalitaj kaj internacie kompreneblaj ŝercoj antaŭ la jarfino!

Persone

● **Bengtsson:** Citinda estas la sekva frazo de Ingemund Bengtsson, prezidanto de la sveda parlamento: "Al homoj, kiuj diras, ke Esperanto estas nur 100-jara revo, mi respondas, ke la revo pri paco estas pli ol mil-jara, kaj ni ja ne ĉesas revi pri tio."

● **Chou:** Lastatempe prof. Chou Io (Ĉinio) instruis Esperanton al 40 sciencistoj de Nordokcidenta Kolegio de Agrikulturo en Wugong. Chou estas prezidanto de Instituto de Zoologio en la provinco Shaanxi kaj redaktas la sciencan revuon *Entomotaxonomia*, pri la klasifado de insektoj.

● **Miyamoto:** Miyamoto Masao verkis 6-paĝan artikolon kun fotoj pri sia vojaĝo en Ĉinio por *Syaki hyôron* (Socia revuo). Ni ne ricevis informon pri la dato de la apero.

● **Mayer:** Novan gvidanton havas Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Li estas s-ro Herbert Mayer, pli frue instruisto de la franca, hispana kaj germana en komerca lernejo kaj de lingvistiko kaj mezepoka literaturo en la universitato de Graz. Li lernis Esperanton jam en siaj gimnaziaj jaroj kaj ekaktivis kiel studento. Dum unu jaro li laboris en Kultura Centro Esperantista en Svislando, redaktante programitajn Esperanto-kursojn.

Oficiala Informilo

SOCIETO ZAMENHOF 1985
Belgio: Grégoire Maertens. Finnlando: Irja Klemola; Liisi Oterma. FR Germanio: Heinz Schindler; Helmut Welger. Francio: Jack-André Rousseau. Hispanio: Josep Castelltort i Riba. Jugoslavio: Petar Fjodorov. Kanado: W.G. du Temple. Nederlando: A.M.E. van Walsem-Schutte; B. Kappert; Ru H. Bossong; W.C. Keizer. Svedio: Signe Stenström. Usono: Armin F. Doneis Sr.; Cecelia Peterson; Eugene H. Thompson Jr.; Thomas A. Goldman; Julius J. Manson. Venezuelo: Christiane Brossaud.

DONACOJ 1985 (Gld.)
ĝis la 31a de aŭgusto

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: S-ino M.L. Roose 1332,31; S-ino L. Drèze 100,00. FR Germanio: O. Fischer 100,00. Norvegio: S-ino M. Landmark 250,00. Nederlando: S-ino I.M.J. Dijkhoff-Lenze 100,00. Diversaj malgrandaj 21,14. Sumo ĉi-jara 11 619,51.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): Britio: D-ino M. Boulton 30,00. Francio: T. Nowak 50,00. Hispanio: Kataluna Esperanto-Asocio 50,00. Sumo ĉi-jara us.$ 3 050,00.

ĜENERALA KASO: Usono: L. Burtzloff 62,38; A. Yeagle 15,00. Diversaj malgrandaj 20,19. Sumo ĉi-jara 6 025,94.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Japanio: Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto (por teleksilo) 3 853,45. Sumo ĉi-jara 3 853,45.

JUBILEA JARO: Svislando: Honore al L. Schaerer 137,41. Dum UK/Aŭgsburgo 77,65. Sumo ĉi-jara 1 905,64.

PROPAGANDA KONTO: Usono: L. Burtzloff 62,38. Sumo ĉi-jara 62,38.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Belgio: S-ino L. Drèze 50,00. Sumo ĉi-jara 265,79.

POR RENOVIGO DE LA DOMO: Belgio: Por Ĉambro E. Ernst 9 988,00. Sumo ĉi-jara 42 133,04.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA
PATRONOJ (minimume $100): Finnlando: Pentti Silander. FR Germanio: Dan N. Maxwell. Japanio: Inumaru Fumio; Nisikawa Toyozo. Usono: Thomas H. Goodman; Jaqueline T. Reynolds; Leonore Shanker; Lura R. Chapman; Neal D. McBurnett; Ralph M. Murphy. SUBTENANTOJ (minimume $25): Aŭstralio: Jean A. Lehane; Eo-Grupo de Oakleigh. Britio: William Auld; Kenneth N. Hart; Kazimiera-Veronika Kronglej; Eo-Societo de Man-

ĉestro; Okcidenta Eo-Federacio; Peter Gardner. Finnlando: Martti Pennanen. Francio: Asocio de E-istoj; Paul Coulot; Pierre Poly; René Villégier; Robert Llorens; Unuiĝo Franca por Eo. Japanio: Taki Rintarô; Ura Ryôzi; Yosida Tadao. Sudafriko: Sud-Afrika Eo-Asocio. Usono: Charlotte Kohrs; Ella H. Gibson; Marie G. Zimmermann; Moshe Lewin; Yul Balbin. Venezuelo: Juan Eduardo Bachrich. AMIKOJ (minimume $10): Belgio: L. Drèze. Britio: Anne M.C. Allen; Bruno Najbaro; E. Semaska; H.R. Morton; Mary Kathleen Najbaro. Finnlando: Erkki Olavi Väisänen; Jukka Rämö; Leo Teräntö; Raija Pehkonen. FR Germanio: Eo-Grupo de Nurenbergo. Francio: Clarisse Mounier; Joseph Jaegy; Luis Lazaro; Madeleine Bouvier; Kultura Societo Esp-ista KESOG. Israelo: Andreo Ŝalamon; Cvi Löwenkopf; Julius Hecht: Italio: Grupo Esp-ista Trentino; Renata Bonvicini. Japanio: Iwao Hirata. Usono: Alan Ried.

PATRONOJ DE TEJO 1985

Belgio: Elvire De Coene. Britio: E.E. Mallett; Tom C. Fraser. FR Germanio: Uwe Joachim Moritz. Francio: Henri Boyet; Patrick Etienne; Jean-Louis Texier. Hispanio: Eo-Grupo de Valencia; Enric Gimeno Palau. Israelo: David Mager; Jehoŝua Tilleman; Josef Murĵan; Josifa Rabino. Italio: Michela Lipari Sato. Japanio: Yosiki Tatumi. Kanado: Paul S. Hopkins. Nederlando: Internacia Eo-Instituto; J.A. Pinto de Sousa; M. Meywes. Nov-Zelando: Larry W. Skiba.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

KOTIZTABELO POR 1986

Lando/valuto	MG	MJ(-K)	MA(-K)	SA	Kto	SZ
Argentino/*guldeno*	6,50	16	40	24	12	80
Aŭstralio/dolaro	5,20	12,80	32	19,20	9,60	64
Aŭstrio/ŝilingo	67	168	420	252	126	840
Belgio/franko	200	500	1250	750	375	2500
Brazilo/*guldeno*	6,50	16	40	24	12	80
Britio/pundo	2,50	6	15	9	4,50	30
Bulgario/*guldeno*	7,50	18,80	47	28,20	14,10	94
Ĉeĥoslovakio/krono	40	100	250	150	75	500
Danlando/krono	38	96	240	144	72	480
Finnlando/marko	21	52	130	78	39	260
Francio/franko	30	76	190	114	57	380
FR Germanio/marko	10,50	26	65	39	19,50	130
Germana DR/*guldeno*	10	24	60	36	18	120
Greklando/draĥmo	290	720	1800	1080	540	3600
Hinda Unio/rupio	20	48	120	72	36	240
Hispanio/peseto	420	1040	2600	1560	780	5200
Hungario/forinto	100	250	625	375	187,50	1250
Irlando/pundo	2,40	6	15	9	4,50	30
Islando/krono	120	280	700	420	210	1400
Israelo/*guldeno*	9	22,80	57	34,20	17,10	114
Italio/liro	5600	14000	35000	21000	10500	70000
Japanio/eno	880	2200	5500	3300	1650	11000
Jugoslavio/dinaro	600	1500	3800	2300	1150	7600
Kanado/dolaro	5,50	13,60	34	20,40	10,20	68
Korea Resp./ŭono	2000	5000	12500	7500	3750	25000
Nederlando/guldeno	12	28	70	44*	22*	140
Norvegio/krono	29	72	180	108	54	360
Nov-Zelando/dolaro	6,50	16	40	24	12	80
Pollando/*guldeno*	6,50	16	40	24	12	80
Portugalio/eskudo	350	880	2200	1320	660	4400
Soveta Unio/*guldeno*	8,50	21,20	53	31,80	15,90	106
Sud-Afriko/rando	6,50	16	40	24	12	80
Svedio/krono	32	80	200	120	60	400
Svislando/franko	10	24	60	36	18	120
Usono/dolaro	5	12	30	18	9	60
TARIFO A/guldeno	7	18	45	27	13,50	90
TARIFO B/guldeno	6,50	16	40	24	12	80

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgo laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.
TARIFO A: Bermudo, Honkongo, Kuvajto, Malto, Saud-Arabio, Singapuro, Venezuelo.
TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. Ĉiuj kotizoj supre menciitaj validas por la kalendara jaro.

* inkluzivas la enlandan imposton de 5%.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado
MJ(-K): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 25 jaroj, revuo *Kontakto* sen plia abonpago)
MA(-K): Individua Membro-Abonanto kiel MJ(-K) plus la revuo *Esperanto*
SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA
Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO
SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (**ne** inkluzivas membrecon en UEA)
PT: Patrono de TEJO pagas duoble la abonon al *Kontakto* (sed ricevas nur unu abonon), por subteni TEJO
DM: Dumviva membro de UEA pagas por la tuta vivo en unu fojo 25-oblon de la kotizo MA. Oni ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj se kaj dum oni ankoraŭ estas malpli ol 26-jara, la revuon *Kontakto*.

Nekrologoj

ESTER ANDRÉN (1905-1985) forpasis la 8an de aŭgusto en Malmö, Svedio. Ekde 1931 ŝi aktive partoprenis la movadon. Ŝi dum multaj jaroj bone laboris kiel la landa peranto de UEA kaj administris la svedan ĝirkonton de UEA. Ŝi siatempe estis la prezidanto de Klubo Esperantista de Malmö, vicdelegito kaj membro de la Loka Kongresa Komitato de la 33a Universala Kongreso, kiu okazis en tiu urbo en 1948.

PIERRE DELAIRE (1918-1985) mortis antaŭ kelka tempo en Orleano, Francio, kie li estis la delegito. Li fondis pro-

pran Esperanto-oficejon, funkciigis korespondajn kursojn, verkis lernolibrojn, teatraĵojn, la informlibron *La dolĉa Franclando* (1972) kaj tradukis la verkon de A. Saint-Exupéry *La eta princo* (1961, reeld. 1984), kiu ĉi-jare gajnis premion en la Belartaj Konkursoj.

ISAI DRATWER (1905-1985), mikrobiologo, mortis la 19an de aŭgusto en Tel-Avivo, Israelo. Li naskiĝis en Odeso, poste transloĝiĝis al Varsovio. Li lernis Esperanton, kiam li estis studento, kaj fariĝis konata pro siaj organiza kapablo kaj informado. Li laboris por la Universala Kongreso de 1937 en Varsovio. Li verkis aŭ kunverkis plurajn lernilojn por poloj. Dum la Dua Mondmilito li suferis en naziaj koncentrejoj. Poste li helpis restarigi la polan Esperanto-movadon, i.a. kiel ĝenerala sekretario de Pola Esperanto-Asocio. Li tradukis la enkondukon (1957) de *Medalionoj* de Zofia Nałkowska kaj la biografion *Doktoro Zamenhof* de Maria Ziołkowska (1959). Omaĝe al sia esperantista laboro, li ricevis la polan ŝtatan ordenon Ora Kruco pro la Plej Altaj Meritoj. En 1961 li enmigris Israelon kaj ekaktivis por Esperanto-Ligo en Israelo (ELI), kies prezidanto li estis ĝis 1968. Dratwer mem publikigis la duan eldonon (1977) de sia *Pri internacia lingvo dum jarcentoj*. En 1980 aperis lia biografio *Lidja Zamenhof; Vivo kaj agado*. Dratwer heredigis sian tutan havaĵon, inkluzive de apartamento, al ELI.

ASEN GRIGOROV (1903-1985), veterano de la Esperanto-movado, mortis la 22an de majo en Sofio, Bulgario. Li estis fekunda tradukanto. Sub la pseŭdonimo Marin Ljubin, li aperigis rimarkindajn originalajn poemojn, en kiuj li priskribas la vivsituacion de laboristoj, i.a. en *Ruĝa aŭroro* kaj *Garbo* (ambaŭ de 1930). Vidu ankaŭ en *Esperanta antologio* (1984). Ekzemplo de la sobra analizkapablo de liaj socirealismaj noveloj estas *La himno* (1931). De 1945 ĝis 1949 li estis la redaktoro de la danublanda revuo *Internacia kulturo*.

GERALD C. JERVIS (1915-1985) forpasis la 2an de julio en Redditch, Britio, kie li estis la delegito. Lia elstara traduko de la dramo *La dresado de la megero* de Ŝekspiro ankoraŭ ne trovis eldononton. Li estis dumviva membro de UEA.

MARCEL JULLIEN (1906-1985) mortis la 3an de julio en Aix-en-Provence, Francio, kie li dum multaj jaroj gvidis la lokan klubon kaj estis la vicdelegito. Li estis dumviva membro de UEA.

JUAN FRANCISCO OCHOA PELAEZ (1941-1985), advokato, mortis antaŭ nelonge en Rionegro, Kolombio, kie li gvidis la lokan movadon kaj estis la delegito de UEA.

PIETRO RIZZO (1907-1985), juĝisto, mortis antaŭ kelka tempo en Ĝenovo, Italio, kie li estis fakdelegito. Li siatempe estis prefekto kaj ŝtata konsilisto. Multjara membro de UEA, li verkis nacilingvan informmaterialon pri la Internacia Lingvo, aŭtobiografian movadan rakontaron *Sesdek jaroj* (1979) kaj *Lineamenti di lessicografia dell' esperanto* (Skizo pri la leksikografio de Esperanto, 1983).

GABRIEL ROUGETET (1902-1985) forpasis antaŭ nelonge en Francio. Li siatempe kunlaboris kun generalo Bastien. Rougetet estis vicprezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto, prizorgante ties rilatojn kun parlamentanoj. Li funkciis ankaŭ kiel membro de la Unesko-laborgrupo de UEA.

GERMAINE WOLFF (1901-1985) forpasis la 3an de julio en Lieĝo, Belgio, kie la loka Esperanto-grupo disponas pri Fondaĵo Wolff pro ŝia donaco. Ŝi estis granda mecenato ankaŭ de UEA.

Anoncetoj

***Tarifo:** ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.*

El Turkio: La 13 anoj de la klubo Kit-Hod en Kırşehir atendas viajn leterojn al PK 35, Kırşehir, Turkio.

Jun(et)a esperantistino, ĉu vi povus imagi fariĝi hejmmastrino en Svislando? Esti ne nur edzino sed ankaŭ kamaradino, kunpromenantino sur montvojoj, kunorganizistino al 41-jara, multflanke hobie interesita (lingvoj precipe nekomerceblaj, naturo ktp.,), fraŭla, pacema, amoplena, sed ofte tro sentimentala aŭ pensema, eble ne facila, malkutim-idea, longtempe solecega sviso? Doni la vivon al 2 ĝis 3 denaskaj svisaj esperantistoj? Via haŭtkoloro ne gravas. Se vi jam havas unu infanon, ĝi estas bonvena akcepti min kiel duonpatron. Mia reva virino estus tiel gracia, knabeca, sentimentala, kaj havus multajn aliajn emojn ol nur al kuirejo kaj lito... Mi estas en sekura pozicio kaj finance povas facile vivteni familion. Skribu do tuj al Paul Schulthess, Postfach 446, CH-8957 Spreitenbach, Svislando (nur el landoj, el kiuj la foriro estas leĝe ebla).

Deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj s-ro Amilton Jorge, rua Cmte Costa 1943/282, BR-78000 Cuiabá-MT, Brazilo.

22-jara pola studento pri elektrotekniko deziras korespondi pri turismo, sporto, filmo, arto ks. S-ro Mieczysław Szydłowski, ul. Ogrodowa 5/4, PL-65-461 Zielona Góra, Pollando.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Nia filineto Viviane naskiĝis tuj post la 70a UK. Pro la bondeziroj dankas Friedrich B. Hilpert kaj Vitoria Travassos-Hilpert.

Lernanto pri elektrotekniko deziras korespondi kun samfakulo, kiu povas helpi lin en la studado. Skribu en facila Esperanto al s-ro Somana Komlan, B.P. 13528, Lomé, Togo.

Infanoj en sveda kristana dimanĉa lernejo deziras ricevi salutkartojn de alilandaj infanoj okaze de Kristnasko 1985. Ni garantias respondon al ĉiu skribinto. Gepatroj, geinstruistoj! Estu afablaj stimuli kaj helpi infanojn skribi al: Dimanĉa Lernejo de Sävedalen, Box 2077, S-433 02 Partille, Svedio.

Licencia astronomo deziras doktoriĝi eksterlande. Ĉu eblas en via lando? Ludoviko Gazzola, Falcón 1040, RA-1832 Lomas, Argentino.

20-jara litovo deziras korespondi pri la Esperanto-movado, DX-radio, muziko, lingvoj k.a. Gintaras Žiaunys, Žemaitijos 9-25, SU-235500 Mažeikiai, Litovio, Sovetunio.

Tutmonde korespondas Alvacy Plauda, Caixa Postal 2685, BR-80000 Curitiba, Brazilo.

"Filatela Interŝanĝo Mondskala", Santiago Alvarez, Apartado aéreo 54-800, Bogotá 2, Kolombio.

Unika ŝanco por kolektantoj!

Pro la neatendita nombro da aliĝintoj

Kongresa Libro de la 70a UK

devis aperi en dua, kompletigita eldono.

La nova eldono enhavas plenan adresaron de la kongresanoj. 152 paĝoj. Prezo: 10 gld. (plus sendokostoj). Mendu de Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Abonu

EL POPOLA ĈINIO

Nun komenciĝas la abonvarba kampanjo de *El Popola Ĉinio* por 1986. Tiuj, kiuj abonas aŭ reabonas nian gazeton en la kampanjo (de 1 jan. 1985 ĝis 28 feb. 1986), ricevos Esperantan kalendaron. La abonvarbantoj ricevos ĉinstilajn memoraĵojn laŭ sia kontribuo en la varbado.
Sendu la abonilon al nia peranto en via lando, rekte al Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (Guoji Shudian), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio, aŭ al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. **Bv. noti**, ke UEA peras nur laŭ la nederlanda tarifo.

ABONTARIFO DE *EL POPOLA ĈINIO*
en lokaj valutoj (ekvalida de 1 okt. 1985):

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	14,00	24,00	34,00
Aŭstrio	AUS	200,00	340,00	480,00
Belgio	BEF	550,00	930,00	1300,00
Britio	GBP	8,00	13,60	19,00
Finnlando	SFK	64,00	108,00	150,00
Francio	FRF	90,00	150,00	210,00
FR Germanio	DEM	30,00	50,00	70,00
Hispanio	ESP	1200,00	2000,00	2900,00
Italio	ITL	18000	30600	43000
Japanio	JPY	3000,00	5400,00	7500,00
Jugoslavio	YUD	500,00	900,00	1300,00
Kanado	CAD	13,00	22,00	30,00
Nederlando*	NLG	34,00	58,00	82,00
Nov-Zelando	NZD	20,00	34,00	48,00
Portugalio	PTE	1100,00	1800,00	2600,00
Svislando	CHF	25,00	42,00	60,00
Usono	USD	12,00	20,00	28,00

* Nederlandaj klientoj bv. aldoni 5% por la enlanda imposto.

Por aliaj landoj en Eŭropo:

GBP	8,00	13,60	19,00
USD	10,00	17,00	24,00

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

GBP	5,00	8,50	12,00
USD	6,50	11,00	16,00

La varbilon kaj senpagan specimenon Guoji Shudian sendas laŭ peto.

HOLLAND-AGENDO 1986 en ESPERANTO

Brila buro-agendo kun 60 kolorfotoj pri Nederlando.

Formato: 16,5-oble 19cm. Amplekso: 144 paĝoj. Preso: 4 koloroj + oro kaj arĝento. En 5 modernaj lingvoj + Esperanto.

Pakita en neŭtrala blanka sendoskatolo. Ĉi tiu unika agendo estas belega persona donaco por amikoj kaj parencoj.

Prezo: 15,00 Gld. Mendu tuj
(Rabato de 10% ekde 11 ekzempleroj).

Mendu telefone aŭ letere de:
Nederlanda Esperanto-Asocio
G.K. Verheule
Uilenstede 210
NL-1183 AP Amstelveen, Nederlando;
☎ 020-457294.

La ununura buro-agendo kun Esperanto

L'Espéranto dans l'enseignement: d-ro Pol Denoël. 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj ĝia instruado. Prezo: 100 B.fr.
Initiation théorique et pratique: d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj, plej taŭga por publikaj kursoj. Prezo: 250 B.fr.; kaseto: 150 B.fr.; ***Corrigé des exercices:*** 80 B.fr.
Aerpoŝtaj leterpapero kaj kovertoj: kun surpresitaj stelo kaj la vorto *Esperanto*. Pakaĵoj de 50 folioj aŭ 50 kovertoj. Prezo: 145 B.fr.
Gluafiŝo: Internacia Lingvo Esperanto: kun homa figuro kaj verda stelo. 7×17 cm. Prezo: 25 B.fr.
Novjaraj gratulkartoj: kvar diverskoloraj kartoj (kun kovertoj) en kvin lingvoj: Esperanto, la franca, nederlanda, angla kaj germana. Prezo: 60 B.fr.
Gluetikedo "Esperanto 1887-1987": Orkolore presita. Uzeblaj sur korespondaĵoj ktp. Prezo de koverto kun 100 gluetikedoj (minimuma mendokvanto): 100 B.fr. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj.

Last' aperis: Dumonata. Informilo pri novaj libroj, kasedoj ktp. Do, kiam vi deziras scii, kio aperis en la libromerkato, bv. tiam aboni al *Last' aperis*. En ĉiu numero vi trovos *Vestfaliaj flugfolioj* de Rikardo Ŝulco. Kun recenzoj pri esperantaĵoj. La abonprezo estas 15 gld. *Ĉiuj tutnovaj devizaj abonantoj, kiuj nun pagas al la konto* "snrl-v" por 1986 (tiu oferto validas nur ĝis 31 dec. '85) ricevos senpage la lastajn ĉi-jarajn numerojn, ekde la momento de abono ĝis la fino de 1985 (ĝis eventuala elĉerpiĝo). Bv. pagi al nia UEA-konto "snrl-v" kaj sendi la duan folion de la ĝirilo al Eldonejo & Librejo SONORILO, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk Belgio.



Post la monumenta *Esperanta antologio* ĵus aperis la dua volumo en la prestiĝa Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto*:

la kvina, korektita eldono de

Plena analiza gramatiko de Esperanto

de Kalocsay kaj Waringhien

Ĉi tiu fama verko malkovras la tradician, klasikan uzadon de la lingvo. En ĝin la aŭtoroj metis la resumon de siaj konstantaj esploroj pri la lingvaĵo de Zamenhof, Grabowski, Kabe kaj aliaj plej famaj aŭtoroj kaj la plej bonan el sia sperto kiel tradukistoj. Temas pri praktika helpilo pri la lingvouzo. Korektita de Gaston Waringhien. Kun grafika rearanĝo kaj la kompleta indekso de la temoj. Kovrilo speciale desegnita de Franko Luin.

Plena analiza gramatiko de Esperanto (1935) de Kálmán Kalocsay (1891-1976) kaj Gaston Waringhien (1901). Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 1985 (5a, korektita eldono). 599p. 22cm. Bindita. ISBN 92 9017 032 8. Prezo: **48,00 gld.** plus sendokostoj. (Rabato de unu triono por samtempa mendo de minimume 3 ekzempleroj.)

URĜA ALVOKO: La sola espero rilate la solvon de la mondvastaj problemoj estas la reveno al la bibliaj instruoj. Por ricevi senpagan libreton kun fascinaj detaloj, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH 17 7LN** aŭ, se ekster Eŭropo al: **P.O. Box 373, Baronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**

KSM
Koresponda Servo Mondskala de UEA

Petu la novan informilon de: KSM, p/a R. Llorens, 121bis, BD. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

Emistudio estas kanada Esperanto-kooperativo kies kunlaborantoj estas membroj de la familio du Temple

EMISTUDIO

Nova Produkto: Emistudio anoncas la UNUAN KASETON DE VESELIN DAMJANOV: TITOLO: VESELIN DAMJANOV KONCERTAS EN KANADO.

La kaseto prezentas operajn ariojn, popolkantojn, kaj kanzonojn ne troveblajn ĉe diskoj. Profesie registrita en teknike plej moderna studio kun kolora bildo de la kantisto, la kaseto havas falditan enfermaĵon kun tekstoj de la Esperantaj kantoj. La kaseto estas unika donaco por neesperantistoj, ĉar ĝi prezentas kantojn ankaŭ en la lingvoj franca, itala, rusa, angla kaj bulgara. Eminenta donaco por amiko, ĝuinda kaj melodia aŭskultado por vi de la plej fama kaj riĉa baritona voĉo en Esperantujo. Subtila pruvo al la ĝenerala publiko pri la beleco de Esperanto. Mendu ĉe Emistudio por $11,00 kan., aŭ ĉe UEA por 30 gld.

BUKEDO DE LA MONATO. Ĉiumonate EMISTUDIO donas premion al bona esperantisto. Gesamideanoj bonvolu sendi al Emistudio nomon de inda esperantisto kun klarigo kial tiu indas ricevi kaj premion kaj "bukedon". Tiu kun la plej granda kvanto de proponintoj gajnos. La premio estas la varo supre reklamita.

ROZBUKEDON KAJ PREMION GAJNAS ĈI-MONATE
IVO LAPENNA EL BRITIO

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

EMISTUDIO 765 Braemar Avenue, Sidney, BC V8L 3S1, Kanado.